

1985 novembro
78a jaro
n-ro 959 (11)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto


POLSKI ZWIĄZEK ESPERANTYSTÓW
Oddział Wojewódzki
ul. Straszewskiego 2/9 tel. 2-87-71
poczt. 819, 30-900 Kraków 1

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Provo elpaŝi
ĉe Monda
Turisma Organizo



Vi trovos,

ke pluraj artikoloj ĉi-monate temas pri klopodoj prezentiĝi en nemovadaj aranĝoj: ĉe la Ĝenerala Asembleo de Monda Turisma Organizo en Sofio (p. 182), en virina forumo de UN en Najrobo (p. 183), en Unesko-kongreso pri junularo en Barcelono (p. 195) kaj dufoje en la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo (p. 196). Inversa maniero veki la intereson de la ekstera publiko estas starigi ion movadan kaj enplekti neesperantistojn. Ekzemploj de tio estas la Premio Zamenhof (p. 183) kaj la seminario de TEJO pri kooperativoj (p. 184). Ĉion ĉi atingis niaj movadaj aktivuloj. Ĉu la meza leganto de nia revuo efektive estas aŭ volas esti tia aganto? Se jes, kiel nia organo direktu kaj stimulu tiun agemon? Tion debatigas la ĉi-apuda teksto. Bonvolu reagi!

Enhavo

- 181 Debato: Kia estu la estonteco de via revuo? (Geoffrey Sutton)
- 182 Turisma agado: Kontaktoj kaj obstakloj (Petâr Todorov)
- 183 Virina agado: "Nun estas eblecoj por Esperanto ĉe virinoj" (Anita Lindblom)
Funkciulo de UN ricevos la unuan Premion Zamenhof
- 184 Kooperativoj: TEJO aktiva ĉe la kooperativa movado (Joel Brozovsky); Mesaĝo el Tuzla
- 185 Landa agado: UFE: la agado de honorita landa asocio (Jean-Louis Texier); Tria festivalo varietea-teatra-kanzona
- 187 Kongresoj: Unua parado de fortoj (Wang Fulong)
Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 71a Universala Kongreso)
- 189 Belartaj konkursoj 1986: Speciala pacpremio; BK85, Originala poezio, unua premio: Vagonvojaĝo (Timothy Carr)
- 190 Recenzoj: *Bukedo el la hungara poezio*; *Poemoj el Hungara antologio*, red. Vilmos Benczik, reĝisoris István Iglódi (Reto Rossetti); *Krado-mondo* de Encarnación Ferré (Edward Ockey); *40 vidindaj lokoj en Ĉinio*, trad. Censinio (Eduard V. Tvarožek); *Nomaro de britaj birdoj/British Bird Names*, komp. Edward Ockey (John Rapley); *Lingvo kaj komunikado – fundamentaj prelegoj kaj artikoloj* (Rikardo Cash)
- 193 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 194 TEJO-paĝo: Agado okaze de IJJ (Barbara Despiney)
- 196 Junularo: Eŭropa Junulara Semajno en Strasburgo (Thomas Kolb); TEJO en EJC denove (Stefan MacGill)
- 197 Kalendaro; Esperanto en radio (George Larglantier)
- 198 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj); Nekrologoj
- 200 Oficiala Informilo de la Centra Oficejo de UEA; Anoncetoj

La kovrilo

Angel Todorov (maldekstre) kaj Petâr Todorov (dekstre) promenas kun la prezidanto de UEA kaj direktorino de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica tra la centro de Smoljan en Bulgario, meze de septembro. La prezidanto de UEA iris tien por ĉeesti la finan parton de la Simpozio pri Turismo, kiu siavice provis pretigi la vojon al interveno pri Esperanto ĉe la Ĝenerala Asembleo de Monda Turisma Organizo, okazinta tuj poste en Sofio. El la tiurilata raporto (v. la paĝon 182) vi eble konkludos, ke la rezultoj estas magraj, kvankam la spertoj sendube estas riĉaj kaj aplikeblaj ĉe la estontaj provoj kaj klopodoj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio; ☎ (03) 770 64 86.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 237 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): ing. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.


Kia estu la estonteco de via revuo?

En Aŭgsburgo leviĝis kritikoj pri la enhavo de ĉi tiu revuo. Konstrua kritiko, se klare formulita, estas tre bonvena kaj bezonata. Dum la pasintaj dek ok monatoj apenaŭ alvenis tiaj reagoj. En la Estrara Raporto pri la agado de UEA en la pasinta jaro aperis la frazo: „Kvankam la redaktoro planas novigojn, li interpretas la ĝeneralan pasivecon de la legantoj kiel signon de kontento” (*Esperanto* 1985, p. 106). Tio, al la redaktoro, ankoraŭ ŝajnas esti ĝenerale ĝusta interpreto. Sed eble utilas provi malfermi debaton pri ĉi tiu revuo, la organo de UEA? La sekva kunmetaĵo el kelkaj kritikoj kun komentoj celas enkonduki tian interŝanĝon de opinioj.

Kiam la revuo denove estos kompostata kaj enpaĝigata en la Centra Oficejo, venos la oportuna momento por renovigi la grafikan aranĝon.

Malfacile estas trovi kompetentajn verkemulojn. La rikolto de uzebla materialo estas minimuma. Ekzemplo de tio estas, ke estis enkondukita — laŭ la bona konsilo de kelkaj — la nova rubriko „Kiel aktivaj”, kun petoj kunlabori. Tia rubriko estas bezo-

Portreto de la dezirata meza leganto, kiu „deziras scii kiel plej bone aktivaj en la movado, kiel varbi, kiel instrui”?



nata, sed preskaŭ neniu reagis. Bedaŭrinde neniel eblas, ke la redaktoro mem produktu tian rubrikon, eĉ se li havas la necesajn kapablojn. Estas bedaŭrinde, ke la revuo estas esence la kreaĵo de unu homo, plejparte dependa de liverado de ekstere.

Sendube estas multe da pravo en la jenaj, antaŭ nelonge ricevitaĵoj komentoj: „Se, leginte numeron de la revuo, oni demandus sin, kiu estas la meza

leganto, oni verŝajne difinus tiun homon jene: 1. Homo informita pri la Esperanto-movado, kiu ŝatas ricevi informojn pri ĝi, kaj volas esti ĝisdata pri ŝanĝoj en la movado; 2. Homo, kiu ŝatas legi kaj aĉeti Esperantajn librojn; 3. Homo, kiu havas bonan lingvoscion; 4. Homo esence pasiva, kiu ricevas la informojn, kiujn la revuo liveras al li, sed ne estas aparte aktiva en la disvastigo de Esperanto. / ... oni devus celi mezan leganton, kiu montras la jenajn karakterizojn: 1. Organizemo — la leganto aktivigas ĉe la loka aŭ nacia niveloj, aŭ en internaciaj Esperanto-organizoj; 2. Lernemo — la leganto deziras plibonigi sian scion pri la movado kaj sian kapablon pri la lingvo; 3. Aktivemo — la leganto deziras scii kiel plej bone aktivaj en la movado, kiel varbi, kiel instrui; 4. Asociemo — la leganto deziras scii pri la personecoj, kiuj gvidas la Asocion; li/ŝi deziras subteni la Asocion.”

Tiom, kiom oni povas diri, ke la nuna redaktoro havas propran politikon, ĝi estas produkti el la havebla materialo kiel eble plej lingve ĝustan kaj ĝenerale interesan revuon, kiu senpartie kaj malferme kovru ĉiun aspekton de la Esperanto-movado.

Oni kritikis la troan aperigon de prikulturaj artikoloj, kiel ekzemple de recenzoj. Tio certe okazis en kelkaj numeroj, pro manko de aliaj taŭgaj tekstoj, sed plia kialo malantaŭ tiu tendenco estas la mirinda kresko en la eldona agado de la tuta movado ekde la 70aj jaroj. Kiel tiu fenomeno — kiu en si mem meritas apartan artikolon — speguliĝu en la revuo?

Unu fako, kiu ricevas kiel eble plej multe da atento, estas la informado. Iuj petis apartan rubrikon pri tio, kiel ankaŭ pri iuj aliaj temoj. La jama sperto estas tia, ke kreo de rubriko ne kreas la necesan materialon, dum ĉiu ricevita taŭga teksto pri informado tamen aperas en la revuo. La sola rubriko, kiu estas modele redaktata kaj plene prizorgata ekster la Centra Oficejo, estas „Esperanto en radio” de George Larglantier. Sed malgraŭ tio, la ekstera informado ĉiam bezonas ankoraŭ pli da atento.

Per la revuo oni povas informi kaj eduki la membrojn, sed ĝi estas perilo de ideoj, instigoj, kritikoj, proponoj ks. La esenca tasko de la redakcio estas kolekti, serĉi, elekti kaj poluri kontribuojn de aliaj, ne mem krei ilin, nek doni al ili apartan tendencon.

La movado havas revolucionan mesaĝon. Ĝi havas la rimedon por forigi lingvan kaj kulturan diskriminadon. Mi opinias, ke la movado ne sufiĉe koncentrite informas pri la unu sola afero, kiun nur ĝi — kontraste al la etnaj lingvoj — povas proponi, nome egalecon sen diskriminado en la komunikado kaj kulturo. La mondo ne amase aliĝos al ni, sed ĉu ni ne identigu Esperanton en la pensoj de la ekstera publiko kun tiu nobla ideo *komunikado sen diskriminacio*? Sed, kvankam la esperantistoj certe kon-

sentas — kaj eventuale miras, ke la demando estas starigita —, baza demando estas, ĉu la movado mem estas sufiĉe tiel orientita? Se ĝi ne estas, mankos tiu orientiĝo ankaŭ en la revuo. Tio validas pri ĉiu temo. La redaktoro ne havas la funkcion nek la rajton uzi la revuon propracele. Ĉu la ĝenerala enhavo de la revuo spegulas la situacion de la movado? Se jes, ĝi havas almenaŭ tiun pozitivan flankon, ke la situacio vidiĝas en la asocia organo kaj sekve estas pli klare direktebla aŭ ŝanĝebla.

La redaktoro bonvenigos viajn komentojn, draŝajn aŭ aliajn.

Geoffrey Sutton

TURISMA AGADO

Kontaktoj kaj obstakloj

Por partopreni en la internacia simpozio „La lingvaj obstakloj al la libera evoluo de turismo”, kiu okazis de la 11a ĝis la 17a de septembro en Pisanica, Bulgario, venis 33 interesitoj el 11 landoj, inkluzive de kvar neesperantistaj organizaĵoj. La programon prezidis inĝ. Petâr Todorov (Bulgario), Leo De Bruyne (Belgio), s-ino Maria Pontika (Greklando), mag. Andrzej Grzębowski (Pollando) kaj Grégoire Maertens (prezidanto de UEA).

Grégoire Maertens formulis: „... la tuja celo de la simpozio estas prepari kontaktojn kun la Asembleo de MTO. Sed fakte la esenco ... estis multe pli granda en tiu senco, ke ni devas kunordigi la diversajn aranĝojn, instancojn kaj iniciatojn, kiuj okazas dise en la Esperanto-komunumo ...”

La urbestro de Smoljan oficiale akceptis ĉiujn partoprenantojn. En alia okazo la prezidanto de UEA donacis al li ekzempleron de *Esperanta antologio*. Poste s-ro Maertens estis intervjuita de korespondanto de Bulgara Informa Agentejo (BTA) kaj ĵurnalistoj. Informis kaj komentis pri la simpozio la bulgaraj televido, radio kaj la centraj ĵurnaloj *Rabotniĉesko delo* (850 mil ekzempleroj) kaj *Oteĉestven front* (280 mil ekzempleroj).

La lastaj du tagoj de la programo okazis en Sofio. La 16an de septembro okazis renkontiĝo kun partoprenantoj en la Ĝenerala Asembleo de MTO. Oni decidis, ke la pola delegacio lanĉu la projekto-rezolucion kiel kunproponanto kun Hungario, Bulgario, kun apogo de Greklando kaj Belgio. Bulgara Esperantista Asocio sendis teleksan proponon al la pola ministro s-ro Jan Cisowski je la nomo de la simpozio kaj transdonis per la bulgara delegacio version de la broŝuro *La lingva problemo en turismo*. La belgaj simpozianoj pretigis la dokumentojn en la franca. Okazis vizitoj en la ambasadoj de Greklando kaj Belgio. S-ino Pontika telefone informis la grekan



ministron s-ron Konstandinidu en Ateno. Oni ricevis konfirmon de s-ro Alfred Ameal, ambasadoro kaj gvidanto de le belga delegacio, pri subteno kaj provo akiri helpon de siaj nederlandaj kaj luksemburgaj kolegoj. La tradukitaj dokumentoj estis persone transdonitaj kun la Esperanto-dokumentoj en la menciitaj ambasadoj.

La 25an de septembro s-ro Jan Cisowski, gvidanto de la registara delegacio de Pollando, antaŭ la pleno de la Ĝenerala Asembleo MTO parolis oficiale pri Esperanto en la rusa lingvo: „Parolante pri ... funkcioj de la turismo, permesu al mi diri kelkajn vortojn pri la Esperanto-movado, kies ideoj naskiĝis en Pollando. En septembro ĉi-jare okazis en Bulgario simpozio dediĉita al la uzo de la lingvo Esperanto kiel rimedo por disvolvi la turismon. Je la nomo de pluraj delegacioj kaj organizaĵoj, ... ni proponas al la estimataj delegitoj projekto-rezolucion pri la menciita demando.” S-ro Cisowski transdonis la projekto-rezolucion al la sekretariato, por ke ĝi multobligu kaj disdonu ĝin en la ceteraj tri lingvoj por fina diskuto dum la lasta kunveno. Tamen, la sekvan tagon — pro teknikaj kaj lingvo-komunikaj kaŭzoj — la tradukoj ne estis pretaj, kaj provo buŝe prezenti la rezolucion fiaskis!

La batalo daŭros! La kontaktoj starigitaj pro la simpozio estis pozitivaj. La 2a Simpozio pri Turismo okazos en Budapeŝto fine de marto 1986. Post du jaroj, en la Jubilea Jaro de Esperanto, okazos la sekva Ĝenerala Asembleo de MTO.

Petâr Todorov

"Nun estas eblecoj por Esperanto ĉe virinoj"

Dum tri semajnoj virinoj ludis gravan rolon en la kenja ĉefurbo. De Internacia Konferenca Centro Kenyatta al la universitato ĝis 13 mil virinoj kaj kelkaj viroj kontribuis al la vivo en jam vivoplena urbo. En ĉiulandaj gazetaro, radio kaj televido eblis informiĝi pri la rezultoj de la Virina Forumo. Jen iom alia bildo.

La Forumo multilate similis al Universala Kongreso de Esperanto. La politikaj diferencoj kelkloke ekbrulis, sed ne povis difekti la tutecon. Tamen, ne mirinde, afrikaj virinoj konsistigis la plimulton. Nevitebla impresio estis, ke tiuj virinoj estas fortaj kaj sendependaj. Ili bone analizis la virinan situacion en siaj landoj kaj pretas informi pri kutimoj, problemoj kaj akiroj. Oni devas tamen konscii, ke la partoprenintoj ofte ne reprezentis la ordinaran virinon en sia lando, sed estis alte edukitaj, memstaraj homoj kun

propra pozicio. La programo ĉiutage enhavis centon da diversstemaj eroj pri paco, sano, ekonomio, tekniko, religio ktp. La prezentadoj kaj diskutoj okazis ĉefe angle – sen interpretado, kaj sekve la partoprenantoj el anglalingvaj landoj ŝajnis esti pli viglaj. Ĉu en 1990 ni havu ankaŭ Esperantajn prezentadojn?

La oficialan UN-kongreson, kiu okazis samloke, sekvis ĉirkaŭ 900 ĵurnalistoj kaj 1 200 observantoj. Spite al tio, ke la konferenco estis pli malgranda, ĝi ne estis same intima kiel la Forumo. Post du semajnoj la dokumento *Estontaj strategioj por ebligi antaŭeniron de virinoj dum la periodo ĝis la jaro 2000...* enhavis punktojn, akcepteblajn por ĉiuj nacioj. Okazaj interrompoj pro teknikaj malfacilaĵoj de la elektronika ekipaĵo aŭ pro traduk-eraroj iom plilongigis la laboron.

Dum interparolo en Najrobo, s-ino Dunja Pastizzi-Ferenčić, direktoro de Internacia Esplora kaj Eduka Instituto por Virina Antaŭenigo de Unuiĝintaj Nacioj (angla mallongigo: INSTRAW), diris, ke moderna tekniko ebligas disvastigi informojn, sed la lingva problemo estas granda obstaklo, aparte en Afriko. Ĝuste nun INSTRAW konsideras tradukadon en plurajn lingvojn. Tio grandigas la ekonomiajn

Funkciulo de UN ricevos la unuan Premion Zamenhof



Asista Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Robert Muller, ricevos Premion Zamenhof por Internacia Kompreniĝo por la jaro 1985, laŭ lastatempa anonco de la elektokomitato por tiu premio. S-ro Muller, la funkciulo de UN ŝarĝita pri aranĝoj por festi la Kvardek-jaran Jubileon de Unuiĝintaj Nacioj en 1985, estas bone konata kiel aŭtoro, pensulo kaj apoganto de internaciaj kunlaboro kaj kompreniĝo. Li estas ankaŭ subtenanto de Esperanto kaj faris la inaŭguran paroladon en la 64a Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno en 1979. Oni formale prezentos al li Premion Zamenhof en Novjorko la 13an de decembro 1985 en la Postdiploma Centro de la Urba Universitato de Novjorko. Prezidos s-ro Grégoire Maertens, prezidanto de UEA.

Robert Muller naskiĝis en Loreno, apud la franca limo kun Germanio. Li havas longan kaj elstaran karieron ĉe UN, kie li eklaboris en 1948. Tra

la jaroj, li servis kiel unu el la fondintoj de la Evoluiga Programo de UN, Politika Konsilanto al la UN-soldataro en Cipro, Konsilanto al la Ĝenerala Sekretario de la Komerca Konferenco de UN, kaj Direktoro de la UN-Buĝeto. Kiel Direktoro de la Oficejo de la Ĝenerala Sekretario, li proksime kunlaboris kun Ĝeneralaj Sekretarioj U Thant kaj Kurt Waldheim.

Lastatempe li akiris reputacion kiel aŭtoro de anglalingvaj verkoj pri la internaciisma vivo, kiel ekzemple *Most of All, They Taught Me Happiness* (Pli ol io alian, ili instruis al mi feliĉon, eld. Doubleday, Novjorko 1978), *New Genesis* (Nova genezo; Doubleday), *A Planet of Hope* (Planedo de espero; Amity House) kaj franclingva romano, kiu gajnis Premion Erckmann-Chatrain, *Sima, mon amour* (Sima, mia amatino). La verko *What War Taught Me About Peace* (Kion milito instruis al mi pri paco) aperos ĉe Doubleday fine de ĉi tiu jaro.

Muller estas multe respektata figuro ĉe UN, elokventa publika parolanto pri UN-temoj kaj forta subtenanto de neregistaraj iniciatoj por internacia organiziĝo kaj monda paco. Li estas diplomito pri ekonomiko ĉe Universitato de Heidelberg kaj doktoro pri juro ĉe Universitato de Strasburgo.

Premion Zamenhof UEA lastatempe starigis por honori ĉiujare personon de internacia reputacio, kiu signife kontribuis al la antaŭenigo de internaciaj komunikado kaj kompreniĝo.

problemojn. Nun, diras la direktorino, estas ebleco rekoni la Esperanto-movadon. La telekomunika evoluo kreas lingvajn problemojn. Tio donas novan epokon por Esperanto; historian eblecon enkonduki ĝin en la ĉeffluon, pere de nova generacio.

Nun finiĝis la Virina Jardeko, proklamita en 1975. Statistiko montras, ke multilate virinoj pli ol viroj suferis de la ekonomia malprogreso, kiu okazis dum la pasintaj jaroj. La Jardeko tamen estis utila, ĉar dum tiu tempo la unuaj paŝoj de la ŝanĝlaboro estis faritaj. La apartaj problemoj por virinoj kaj la obstakloj kontraŭ evoluo estas rekonitaj, kaj la strategioj por daŭra laboro estas fiksitaj.

Anita Lindblom

KOOPERATIVOJ

TEJO aktiva ĉe la kooperativa movado

Kooperativoj kaj junularo estis la temo de internacia seminario en Tuzla, Jugoslavio, kiu kunigis gejunulojn kaj aron da gravaj jugoslaviaj fakuloj pri kooperativoj por studi la nuna kooperativan situacion kaj ellabori eblecojn por gejunuloj rilati al kaj aktivi en la kooperativa movado.

La seminarion, kiu okazis inter 22a kaj 28a de septembro 1985, organizis la Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio (JEJA) en kunlaboro kun la Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO. La laborlingvoj de la seminario, kiu estis oficiala programero de la Internacia Junulara Jaro proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, estis la serbo-kroata, Espe-

ranto kaj la angla. Oni samtempe tradukis inter la tri lingvoj per sistemo de personaj aŭdiloj.

Dum la inaŭguro, salutis la seminarianojn pluraj politikaj, kulturaj kaj sociaj agantoj kaj direktoroj; inter aliaj, Milan Uzelac, sekretario de la Socialisma Unuiĝo de Junularo, la tutlanda tegmenta organizo kiu kunordigas la plimulton de la junularaj organizoj en Jugoslavio, kaj Ivan Orlić, sekretario de la Socialisma Junularo de Bosnio kaj Hercegovino (la respu-



La aŭtoro intervenanta en la debaton por doni informojn pri kooperativismo en Usono.

bliko en kiu troviĝas Tuzla), kaj prezidant(in)oj de diversaj soci-politikaj organizoj en Tuzla mem.

La reprezentantaro kaj informado pri kooperativoj en Jugoslavio estis ampleksa kaj impona. La listo de gravuloj el la jugoslavia kooperativa movado, kiuj prelegis aŭ partoprenis en la seminario, estas multe tro longa por aperigi ĉi tie. Dum la ekskursoj, la seminarianojn bonege akceptis kelkaj lokaj kooperativoj. Ni povis vidi pli konkrete la historion,

Mesaĝo el Tuzla

Okaze de la Internacia Junulara Jaro, en Tuzla (Jugoslavio) okazis Internacia Seminario pri la temo „Kooperativoj en funkcio de soci-ekonomia evoluo kaj laborigo de la junularo”, en kiu partoprenis pli ol 120 personoj el 14 landoj.

Dum la seminario la partoprenantoj interŝanĝis spertojn pri la stato kaj diversaj aspektoj de la kooperativa movado en la mondo.

La seminarianoj konstatis ke gravaj ekonomiaj problemoj de la moderna mondo rekte influas la pozicion de la junularo en ĉiuj opaj socioj, precipe rilate ĝian laboran engaĝiĝon.

Ni trovis ke en solvado de tiu problemo antaŭenigo de kooperativismo inter la junularo, ties ligiĝo kun la koncernaj ekonomiaj sistemoj prezentas latentajn eblecojn por pli vasta laborigo de

la juna generacio. Eĉ plie, la kooperativismo kontribuas ankaŭ al demokratigo de laboro, edukado kaj socia engaĝiĝo de junaj homoj.

Ni trovis ke la Internacia Lingvo Esperanto kiel instrumento kaj la Esperanto-organizaĵoj kiel organizantoj kreis al ni tre taŭgan kadron por nia efika komunikado kaj sukcesa laboro de la seminario.

Konsiderante la celojn de la Internacia Junulara Jaro, ni, partoprenantoj de la seminario, mesaĝas al ĉiulandaj ŝtataj instancoj, ekonomiaj asocioj, soci-politikaj organizoj, edukaj institucioj kaj junularaj movadoj dediĉi seriozan atenton al la fenomeno de kooperativismo kiu kontribuas ke per ekonomia partopreno de gejunuloj oni certigu soci-ekonomian evoluon de la landoj kaj konservu pacon en la mondo.

La partoprenantoj de la Internacia Seminario „Kooperativoj kaj junularo”, Tuzla, 28.09.1985

agadon kaj socian, ekonomian kaj kulturan rolon de tiuj kooperativoj en la regiono.

Bedaŭrinde, la ekster-jugoslavia partoprenantaro estis iom magra. Tamen, aŭdiĝis skizaj raportoj pri la kooperativaj movadoj en Hungario, Usono, Britio kaj Hispanio. Aparte interesa estis rakontoj pri kibucismo en Israelo, fare de Michael Kapel, el Aŭstralio.

Dum la seminario, evidentiĝis ke multmaniere la celoj de la kooperativa movado kaj la Esperantomovado similas. Tiel la seminarianoj kaj TEJO faris du kontaktojn, kiuj donas esperojn por estonta kunlaboro. La unua estas la Kooperativa Esperantomovado kaj ĝia organo, *Kooperativa Stelo*, Pf. 191, H-5601 Békéscsaba, Hungario [Telefono (66) 25-241]. La dua estas Mihajlo Juhas kaj Petar Šešlija, prezidanto kaj sekretario de la Jugoslavia Asocio de Lernejanaj Kooperativoj, kiuj esprimis pretecon kunlabori kun TEJO por antaŭenigi komunajn celojn.

Joel Brozovsky

LANDA AGADO

UFE: la agado de honorita landa asocio

En la septembra numero ni mallonge raportis, ke Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) ricevis la Trofeon Fyne. Jen priskribo de la tuta agado de UFE, verkita de ties antaŭa prezidanto. Espereble ĝi interesos i.a. gvidantojn de aliaj landaj asocioj. Tro multe de ili laboras pli-malpli izolitaj en sia nacia medio, peze refarante laboron jam pli bone faritan alilande.

La bazo: Ĉirkaŭ cent Esperanto-unuoj, t.e. 200 ĝis 250 instruantoj, gvidantoj, federaciaj aŭ lokaj animantoj, respondecas pri la baza agado en Francio. La aktivajn membrojn reprezentas naciskala komitato de 24 homoj, kiu kunvenas trifoje jare; la naŭ-persona estraro naŭfoje.

La vendado de instruiloj dum pluraj jardekoj montras merkaton de duonmiliono da informitaj francoj. Sed kalkulebla estas nur la kvin ĝis dek mil esperantistoj, dum la aktivuloj ĉe UFE ne superas, laŭ la jaroj, mil cent. Pro tio ĝia laboro estas duflanka: konservi la Esperanto-parolantojn per taŭgaj servoj kaj animi ties kernon por varbi novajn interesitojn.

Kultura asocio: Laŭ sia statuto UFE estas kultura grupo. Nura instruado de la lingvo ne kontentigas nin, kaj rigarde al la ekstera publiko ni volas montri nian kultureman flankon. Pro tio kreiĝis la kanzonteatraj festivaloj. Por pruvi la peradon de Esperanto

inter la literaturoj, ni ĉiujare publikigas Esperante du aŭ tri verkojn el la franca. Ni malfermis fonduson, por ke ne perdiĝu, atendante aperigon, tradukoj jam faritaj. Ni disponas pri biblioteko ĉe nia sidejo, kaj loka grupo kreis eĉ nacian muzeon por kolekti ĉies arkivojn. Preleg-turneoj okazas unu- aŭ dufoje jare kaj ni aŭspicias turismajn semajnojn.

Informfako: Por daŭre renoviĝi, dinamika asocio respondecas pri grandskala informado. Krom la kutimaj faldfolioj, UFE nun eldonas kvinfoje jare franclingvan bultenon, sendatan al la oficialaj kultur-, inform- kaj instruinstancoj, al la amaskomunikiloj kaj al la plej gravaj asocioj. Ĝi estas aparte elpensita 12-paĝa bulteno, kiu informas pri ĉiu grava okazaĵo kaj kiu iras krome al ĉiu eksmembro kaj informpetinto.

UFE eldonis 20 000 ekzemplerojn de la libreto *Aliro al la Internacia Lingvo*. Senpage havebla, ĝi sin turnas al homoj pretaj kompletigi siajn bazajn informojn. Kompleta, poŝformata, ilustrita, 60-paĝa, ĝi estas akompanata de reviziebla listo de 200 informdonantoj kun adresoj. La lude testa reklamilo *Unuaj rendevuoj kun Esperanto* — dek folioj por sinsekva resendo — estis eldonita en cent mil ekzempleroj. Oni disdonas ĝin en foiroj, forumoj, ekspozicioj, bibliotekoj ks.

En 1983 aperis la grandformata, nun tutmonde konata ilustrita kaj prestiĝa broŝuro *La rajto je komunikado*, kiu estas nia vizitkarto por publikaj rilatoj ĉe la gazetaro, politikistoj, artistoj, instruaj, komercaj kaj sociaj medioj. Ĝi estas granda pluso, ĉar ĝi antaŭrespondas la plimulton de la kritikoj, ŝparas ne ĉiam legitajn leterojn kaj digne retenigas en dokumentujoj. Nemalhavebla elemento ĝi estas ankaŭ por la t.n. „rebatservoj”.

UFE disponas pri 80 kvadrat-metra sidejo, dank'al malavaraj monoferoj de siaj membroj. Tiu konstanta adreso (4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris) ebligas uzi telefonrespondilon, nian neniam dormantan orelon, kaj telefoninformilon kun ŝanĝeblaj registroj pri niaj evoluo kaj kampanjoj.

Nia nacia organo, *Franca esperantisto* (eldonata ekde 1908), provas esti la montrofenestro de la 12 lokaj federacioj. Ĝi celas interŝanĝon de spertoj, raportas la decidojn kaj detale argumentas pri ĉio nova. La revuo ligas novbakitojn kaj nefervorajn esperantistojn kun la pli kuraĝaj skipanoj. Minimume unufoje jare oni sendas ĝin reklame al ĉiuj konataj kotizintoj, por provi reveki ilin.

Instruado: Kompreneble la dua plej grava tereno estas la instruado. Niaj instrulibro ne estis kadukaj, sed ne renovigitaj de 40 jaroj. Sentiĝis urĝe fari tion. Pretas instrui ĉirkaŭ 150 homoj, plejparte neprofesia. Ili meritas specialan materialon, kompletan, sed sen superflua balasto laŭ la nun akceptita koncepto prefere lerni la plej ofte uzatajn radikojn. Niaj kom-

petentaj fakuloj kreis serion da modernaj lerniloj. Oni reverkis nian trigradan perkorespondan kurson. Por memlernantoj proponblas la kompleto *Esperanto por ĉiuj*. Ekzistas kasetoj por ĉiuj tiuj diversaj kursoj. Por kursgvidantoj ni pretigis ankaŭ staĝ-gvidilojn kaj konversaciajn trejnilojn. Fine, nia libroservo provas atenti la pli facilajn legaĵojn por komencantoj.

Laborpolitiko: Kiel verŝajne ankaŭ en aliaj landaj asocioj, la plimulto de la aktivuloj jam havas funkcion, sed ilin apudas granda rondo da simpatiantoj. Por instigi pli proksiman kunlaboron, estis decidite peti perleteran voĉdonadon por elekti komitatanojn. Tiel la nombro de voĉdonantoj rapide altiĝis de 100 al 500. Tio certigis nin pri pli larĝa apogo malantaŭ niaj decidoj. Same ni faras por la kotizperiodo. Ankaŭ francoj taksas la kotizojn tro altaj. Ni fiksas ilin je la valoro de unu tago laŭ nia nacia t.n. minimuma garantiita salajro. Kompreneble estas ankaŭ malpli altaj kotizoj, sed ni argumentas, ke la disvolvo de Esperanto ion plian meritas. Iom post iom ĉiu lernkotizo entenos unujaran kotizon al la asocio.

La investo en komputilo celas malpezigi la taskojn de la bonvolemaj deĵorantoj. Tion ebligis



Texier prenis aktivan rolon en la internacia seminario pri informado, kiu kunvenigis landajn agantojn tuj antaŭ la aŭgsburga kongreso.

Klubo 87: eble premiero en la jubileaj iniciatoj. Ties membroj promesas pagi dum difinita periodo unu ĝis kvin jarkotizojn, por sekurigi niajn esplorojn.

Komisionoj: Necesas konstante reprimensi ĉiujn fakojn. Unu komisiono, helpe al UEA, rilatas kun Unesko kaj parlamentanoj kaj provas agnoskigi Esperanton kiel elekteblan ekzamenlingvon. Aliaj kunordigas instruajn aŭ informajn serĉojn. La plej nova, pri praktikado, kompilas informojn pri ĉio rilata al la uzebleco de Esperanto, por ĝisdatigi la argumentojn en la varbado.

Reklampolitiko: Por enkadriĝi en vere internacian idearon, ni adaptis nian statuton, por ke ĝia dua paragrafo referencu al la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Ni opinias tion minimumo, kian eĉ neŭtrala asocio ne rajtas preterlasi. Ni deziras, ke ĉiuj bezonantoj disponu pri alirebla demokratia komunikilo.

Kiajn bremsojn ni plej ofte renkontas interne de la movado? Ni citu la francojn, kiuj aliĝas al UEA, sed ne eniras la nacian strukturon, la homojn, kiuj ne pretas kompreni, ke la profitoj de libroservo aŭ abonperado estas la investaĵo por niaj reklamprovoj, la instruantojn, kiuj iel kaŝas la nomojn de siaj lernantoj, la senpacienulojn, kiuj kontraŭstaras niajn klopodojn ĉe altaj instancoj per tro 'rektaj' mispaŝoj. Sed la granda obstaklo kuŝas fakte en la disdivido: sendependemo pro specife fakaj, socipretekstaj aŭ geografiaj kialoj senigas nin je la amasfenomeno. Rapide trioblighus nia potencialo, se la 'samo-piniantoj' aspektus 'unuigitaj'.

La 7an de aprilo la komitato de UFE kunvenis i.a. por pesi la agadon de la lastaj jaroj kaj prepari novan kvarjaran planon. Nun UFE planas malŝparsi sian tutan potencialon por informi, informi, informi...

Jean-Louis Texier

Tria festivalo varietea-teatra-kanzona **23-24 novembro 1985**

Sabate

- 13.00 *La kalva kantistino* de E. Ionesco; GEJ *Unuopaĵo*; Stefan MacGill
Cikonioj laŭ A. Sokorski; Dorota Swierstok kaj Leszek Lewandowski de la Studenta Esperanto-teatro de Zielona Góra
- 16.30 *Kanzonoj*; Roman Bura kaj Ĵak Le Puil *Varieteoj*; Jopetro Danvy, Georgo Lagrange, Lo kaj Pat
- 20.30 Geecoĵ iam kaj tiam: *La plezuro disiĝi* de J. Renard kaj *La amato* de H. Pinter; La Krizalido

Dimanĉe

- 14.00 *Danco, ĉu infana ludo?* baletoj kun la trupo de Claudine Tavares miksite kun poeziaĵoj de W. Auld deklame de Michel Audibert
- 17.00 *Unuopaĵo*; Hervé Gonin *La Ruza Kruĉo*; S. Sire, L. Septje, Ĵ. Le Puil, A. Le Quint, Cendrino, Ĵ. Kadja ktp.

Kultura Centro A.M.O.R.C. 199bis rue Saint-Martin, 75003 Paris.

Biletoj: unu spektaklo 35FF, kvin 140FF; ĉe la eniro. Informoj: U.F.E., 4bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio.

Unua parado de fortoj

La periodo de la 22a ĝis la 29a de aŭgusto vidis historian okazaĵon: la Unuan Ĉinan Kongreson de Esperanto. Laŭ peto de la redaktoro la sekvan raporton liveris Wang Fulong, instruisto en Fremdlingva Instituto. Tiu historia kongreso estis "UK-eca fajroprovo" por la organizantoj de la venontjara Universala Kongreso, kaj tial donas ian antaŭguston por la venontjaraj eksterlandaj kongresanoj.

En la lasta tagdeko de aŭgusto okazis en Kunming, la pitoreska ĉefurbo de Junnan-provinco, la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto. Tio estas la unua tutlanda kongreso de Esperanto post kiam Esperanto estis enkondukita en Ĉinion antaŭ pli ol 80 jaroj. La kongreso estis vere ideala Esperantujo, pli ol 600 delegitoj el diversaj lokoj, interalie Tajvano, Honkongo, kaj Makao, el diversaj profesioj kaj socitavoloj. Inter ili estis movadaj pioniroj, veteranaj esperantistoj, mezaĝaj esperantistoj; tamen la plimulto estis juna. La plej juna estis la sepjara Shasha.

La delegitoj ĉiuflanke priparolis la ĉinan Esperanto-movadon, ties perspektivon kaj evoluon. Ili estas plenaj de fido pri la estonteco de Esperanto kaj volonte sin donas al ĝi. Por profunda kaj vasta disvolvado de la movado en nia lando la delegitoj elmetis multajn atentindajn proponojn.

Fakaj kunvenoj estis tre oftaj kaj viglaj. Tie oni interŝanĝis spertojn, varme diskutis kiel oni povas bone enkonduki Esperanton en sian fakan kampon, kiel pere de Esperanto oni faras sciencajn esploradojn.

Ankaŭ la simpozio akiris sukcesojn. Specialistoj prezentis siajn disertaĵojn Esperante, instruistoj atente pridiskutis la instruprogramon de Esperanto en la altlernejoj. Bedaŭrinde mankis esperantologia kunveno. Mia opinio, tio estus tre grava; ĝi havus eĉ decidan signifon.

Verŝajne pro mia profesio, mi tre interesiĝis pri la provleciono kaj modelleciono, kiujn montris s-ro Umeda Yosimi, vicprezidanto de UEA. El tio mi multe lernis, pro kio mi elkore dankas. Similajn ekzemplojn oni devas konstante fari, por altigi la arton de la instruado kaj kulturi esperantistojn kun pli alta lingvonivelo. S-ro Umeda prezentis ankaŭ la internacian Esperanto-movadon. Li proponis, ke en la urbo Kunming estu strato aŭ placo nomita laŭ Esperanto aŭ Zamenhof, tiel la unua en Azio. Per tondra aplaŭdo la ĉeestantoj esprimis subtenon, kaj lian proponon la respondeculoj de la magistrato de Kunming tuj akceptis kun ĝojo.

Nacia vespero, baloj, ekskursoj kaj intima interparolado amikigis la partoprenantojn. La bazaro de esperantaĵoj estis tre vigle vizitata. Tie oni povis aĉeti multajn objektojn, kiujn oni ne povas akiri en sia loĝloko.

La tuta semajno de densa Esperanta etoso profunde impresis nin. La Unua Ĉina Kongreso de Esperanto estas grava, ĉar ĝi markis la novan etapon de la ĉina Esperanto-movado. La kongreso estis parado de niaj fortoj kaj samtempe servas kiel preparo por la 71a Universala Kongreso venontjare en Pekino. Ĝi havas strategian signifon kaj certe stimulos la landan movadon.

Wang Fulong

Kongresal Komitato

71a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Pekino (Ĉinio), 26 julio – 2 aŭgusto 1986

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

**Adreso de LKK: p/a Ĉina Esperanto-Ligo
P.O. Kesto 825, Beijing, Ĉinio**

Loka Kongresa Komitato: La LKK konsistas el eminentaj agantoj de la socia kaj esperantista vivo de Ĉinio. Ĝia prezidanto Ye Laishi (Ĵelezo) estas konsilisto de la Ŝtata Komisiono de Reformado de Skriba Sistemo. El la vicprezidantoj Chen Yuan estas vicministro de la sama komisiono kaj Zhang Qicheng ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo. Ĝenerala sekretario estas Zeng Heyao kaj sekretario Dai Songen. La ceteron de la LKK kon-

sistigas Zhu Mingyi (kasisto), Zhang Haiping (kongresejo), Gong Peikang (ekskursoj), Li Yuping (artaj aranĝoj), Nan Youli (loĝado), Zou Guoxiang (kulturaj aranĝoj), Xu Senrong (dokumentoj, ĝicetoj), Jiang Hongzhang (junularaj aranĝoj), Hang Jun (gazetara servo), Tan Xiuzhu (eksterlanda informado) kaj Zhang Zai (libroservo).

La kongresa temo: La jaro 1986 estas proklamita de Unuiĝintaj Nacioj la Internacia Jaro de Paco. Por akordigi la enhavon de la kongresaj laboroj kun tio, la Estraro de UEA elektis kiel la temon de la UK „Interkompreniĝo, paco, evoluo”.

Filatelaĵoj: La pekina UK verŝajne pliriĉigos Esperanto-temajn filatelaĵojn, ĉar okaze de ĝi la Ĉina Poŝto intencas emisii specialajn poŝtmarko(j)n kaj stampo(j)n. Tamen, definitivaj decidoj ĉi-rilate ankoraŭ ne estas faritaj.

Kotizoj: La tarifo dum la unua regula kotizperiodo (valida ĝis la 31a de decembro) estas la jena (ĉiuj prezoj en nederlandaj guldenoj):

Kat. 1: Ne membro de UEA 187,50

Kat. 2: Individua membro de UEA
(baza kongreskotizo) 150,00


Kat. 3: Kunulo/junulo/handikapulo,
kiu ne estas membro de UEA 112,50

Kat. 4: Kunulo/junulo/handikapulo,
kiu estas individua membro de UEA 75,00

La karavana kotizo por grup-aligoj de 25 aŭ pli da personoj estas 90 % de la baza kotizo. Atentu, ke ĉiuj prezoj plialtiĝos post la jarfino.

Perantoj: Diference de la koncerna informo en la Unua Bulteno, la peranto por *Aŭstralio* estas s-ino Sylvia M. Burkitt, 32 George Mobbs Dr., 2154 Castle Hill, N.S.W. kaj por *Kanado* s-ino Merle Haltrecht-Matte, 122 Seaton Street, M5A 2T3 Toronto.

Internacia Kongresa Universitato (IKU): La 39a sesio de IKU okazos kadre de la 71a UK. La rektoro de IKU estos prof. Ye Junjian, elstara verkisto kaj i.a. komitatano de la Ĉina Federacio de Literatura kaj Arta Rondo. En la Esperanto-komunumo li estas konata kiel la originala verkisto Cicio Mar kaj pro la ĵus aperinta traduko (fare de W. Auld) de lia romano „Montara vilaĝo”.



Rektoro Ye dum interparolo kun prof. Neergaard dum la UK en Aŭgsburgo.

Universitataj profesoroj kaj simile kvalifitaj personoj estas invitataj proponi prelegon antaŭ la 20a de januaro 1986 al la Komisiono pri IKU ĉe ties sekretario prof. Bruce Sherwood, Dept. of Physics, Carnegie-Mellon University, Pittsburgh, PA 15213, Usono. Al tiu adreso oni sendu fotoportreton kaj kvar kopiojn de titolo, resume, bibliografio kaj biografieto. Prelegantoj ricevos danksumon sed ne vojaĝkostojn.

Interesiĝo en la Tria Mondo: La kongresa administracio ricevis multajn helpopetojn de junaj tria-

mondanoj, kiuj volas partopreni la pekinan kongreson. Por povi eĉ nur iomete respondi al tiuj petoj kaj sekve pli tutmondigi la kongreson, UEA kalkulas pri solidareco de la esperantistoj en pli riĉaj landoj kaj alvokas pri donacoj al la Adopta Kaso de la UK.

Loĝado: LKK jam delonge rezervis grandan nombron da ĉambroj en pluraj hoteloj en Pekino, unuavice en tiuj, kiuj situas proksime al la kongresejo. Laŭ la nuna stato de la negocoj, ne eblas en Ĉinio apartigi la loĝadon disde manĝoj, urba transporto kaj enurbaj ekskursoj. Kalkulante en tiu maniero, bona hotelo en Pekino kostas ĉ. 160 guldenojn tage (en dulita ĉambro, kun du manĝoj, transporto kaj ekskursoj). La samo en luksa hotelo kostas inter 240 kaj 270 guldenojn. Tamen, LKK jam de pluraj monatoj provas certigi kelkcenton da litoj en studentaj domoj aŭ en komuna loĝejo, sed tia loĝigo de eksterlandanoj ĝis nun ne estis praktikata en Ĉinio kaj la koncernaj negocoj malrapide progresas, kvankam „ekzistas lumo”, kiel oni lastatempe komunikis el Pekino. Meze de novembro en Pekino okazos definitivigo de la kontraktoj pri loĝado, ekskursoj kaj ĉiuj aliaj servoj, pri kiuj la mendilo kutime aperas kun la Dua Bulteno. La plano estas, ke la Dua Bulteno aperu kiel eble plej frue en 1986 (tre verŝajne jam en januaro). Tiel LKK kiel la CO de UEA faras sian maksimuman eblon por atingi malpli altajn restadkostojn dum la 71a UK. Espereble, en la venonta komuniko ni jam povos diri al vi pli bonajn novaĵojn ĉi-rilate.

Vojaĝoj: Kvankam ni en la junia numero de *Esperanto* promesis tre baldaŭ elpaŝi kun la vojaĝplanoj de UEA por la 71a UK, tio bedaŭrinde ankoraŭ ne estas farebla. Ni ja okupiĝas pri la organizo de tiuj grupvojaĝoj, sed ilia definitivigo povos okazi nur meze de novembro dum vizito de UEA-representanto al Pekino. Kiel ni antaŭe anoncis, la plej malmultekostaj flugoj kostos iom pli ol 2 000 guldenojn, sed se oni volas ekskursi ankaŭ tra Ĉinio kaj resti tie plia(j)n semajno(j)n, necesas kalkuli pri kelkaj pliaj miloj da guldenoj. Intertempe, pluraj privataj esperantistoj anoncas siajn karavanojn al Pekino, profitante tiel la mankon de detaloj pri la UEA-karavanoj. Oni kelkfoje asertas, ke estas ia limigo de la nombro de partoprenantoj en la Kongreso kaj la grupaj vojaĝoj, sed tio laŭ nia scio estas senbaza informo. Aliĝo al tiu aŭ alia grupa vojaĝo certe estas privata prefero de ĉiu unuopa kongresano. Tamen, laŭ nia scio ne necesas rapidi pri la elekto de la vojaĝo, kvankam ja necesas ŝpari por ĝi. Tiurilate la kongresanoj povas, sen ajnaj kostoj, deponi monon en sia UEA-konto, eĉ se poste montriĝos necese ĝiri tiun sumon de UEA al iu el la privataj vojaĝorganizantoj.

Statistiko: La 17an de oktobro estis enskribitaj 1 017 kongresanoj el 49 landoj.

Speciala pacpremio

La Belartaj Konkursoj jam dum 35 jaroj servas kiel valora instigilo por nia vivanta literaturo. Por ke ili daŭre restu tio, ni devas respekti ilian tradician rolon kaj klopodi laŭeble alte teni la kriteriojn, kiuj devas tie validi.

Pacpremio: Por 1986 funkcias aparta branĉo, laŭ decido de la Komitato de UEA, por pacpremio. Por ĝi estas invititaj konkursaĵoj prozaj, poeziaj kaj tea-



traĵaj, kiuj inde pritraktas pacon kiel ĉeftemon en arta maniero. Ĉiu konkursaĵo estu signita per la vorto „Paco”. Nur unu premio estos aljuĝita en ĉi tiu branĉo.

Kanto ekfunkcias kiel branĉo en la Belartaj Konkursoj de UEA ekde 1984. Ĝia iniciatinto estas s-ro Ahn Song-san el Seulo, Korea Respubliko, kiu donacis monsumon, per kies rento premiigos ĉiujare

unu verko. La premio nomiĝas „Premio An-okin Korea pri Kanto”. La sekvaj kondiĉoj validas por tiu ĉi branĉo:

1. Teksto kaj melodio devas ambaŭ esti novaj kaj ankoraŭ ne publikigitaj;
2. Teksto kaj melodio povas esti verkitaj de malsamaj aŭtoroj;
3. Teksto kaj muziknotoj estu senditaj en po kvar ekzempleroj al la sekretario de la Belartaj Konkursoj kaj devas lin atingi plej malfrue la 31an de marto 1986;
4. La kanto premiita estu publike prezentita de kantisto aŭ ĥoro se eble en la koncerna UK, kaj en kazo de neeblo, en la postjara UK;
5. La premiitaj kantoj estu ankaŭ laŭeble presitaj tekste kaj muziknote en iu formo.

Ĉi tiu branĉo estas la kvara aldonaĵo al la Belartaj Konkursoj dum la lastaj kelkaj jaroj. La ceteraj estas la fotografia branĉo, la eseo por Premio Luigi Minnaja kaj la Infanlibro de la Jaro.

Konkursaj detaloj: Rajtas konkursi ĉiu, kiu ne gajnis dum la tri tuj antaŭaj jaroj unuan premion en la branĉo, por kiu ŝi aŭ li konkuras. Unu persono povas partopreni per maksimume tri verkoj en ĉiu literatura branĉo.

Poezio: Sen fiksita maksimuma longo de konkursaĵo. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo de konkursaĵo 200 × 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma ludodaŭro 25 minutoj. Tri premioj.

BELARTAJ KONKURSOJ 1985

ORIGINALA POEZIO: UNUA PREMIO

Vagonvojaĝo

Sunosplitoj silkaj, sulkoj por floraro,
Glitas; la lokomotiv-savonto vibras;
Birdoj, nuboj kaj ondetoj anticipas;
Jen iluminado! Fine la signalo!

Ni eskapas de l' urbego malamika;
Heziteme sub barantaj muroj; rampe
Tra minacaj fabrikejoj; ekkurante
Preter patrolstratoj ĝis la bonveniga

Verdo viva tuj malligas, ĝoje flamas.
Elsternante sanktan spacon, dolĉan dison,
Eĥigante ene praan paradizon,
La liberigita trajno nun elanas.

Forgesinte la unuajn penajn kolorojn,
Anapeste skandas mejlojn la vagonoj,
Paŭzas nur por la cenzuraj stacidomoj,
El ĉielo, kampoj ĉerpas metaforojn.

Kaj for, faldo super faldo, flustre flutas
Montoj: "Venu kaj vin vindu valoj mildaj".
Klariĝante, keltkoloraj, tartankiltaj
Krestoj pli kaj pli akcele ĝigojn ludas.

Jam apudaj, per trumpetoj imponegaj
Puŝas pintoj proponantaj povon alte:
"Kien nebulnimboj kronas paŝu arde
Ĝis rivelos ventoj al distancoj vekaj".

Kaj mi veturadis sur la ebenaĵo
Maren, dum montaroj transen min invitis.
Krom vasteco, ĉirkaŭpremon mi avidis.
Ĉu mi trovos amatinon post vojaĝo?

Al revulo kaj vagado mankis limo.
Sed gaelaj lipoj gajaj ne min logos
Al amado, kaj Okcitanujo vokos
Softe, ke mi ekpilgrimu al Ivino.

Ho, floreto franca, ĉiam freŝa, kion
Revis vi dum tago tiel promesplena?
Ĉu la koro estis same tremetema?
Ĉar mi estis vin amonta baldaŭ, tiom.

Timothy Carr

Eseo: Temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia prefere en ligo kun la Internacia Lingvo. Longo ĉ. 400 × 65 tajpospacoj. Unu premio (Premio Luigi Minnaja).

Infanlibro de la Jaro: Oni rajtas proponi ĉiujn infanlibrojn, kiuj aperis dum la jaro 1985, originalajn kaj tradukitajn. Unu premio.

Fotografio: Minimuma formato 13 × 18 cm. Fotoj povas esti nigra-blankaj aŭ koloraj. Tri premioj.

Kanto kaj Pacpremio: Vidu supre.

Reguloj: La konkursaĵoj en la branĉoj poezia, proza, teatraĵa kaj kanta devas esti senditaj en kvar ekzempleroj al la adreso de la sekretario de la Konkursoj: S-ro Alec Venture, 22 A Grosvenor Road, Wallington, Surrey, Britio SM6 OEF, kaj devas atingi lin plej malfrue la 31an de marto 1986. Por la branĉo Infanlibro de la Jaro oni sendu tri ekzemplerojn de la koncerna libro al la adreso de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, same ĝis la 31a de marto 1986. En la branĉo Fotografio sufiĉas sendi unu ekzempleron de ĉiu konkursaĵo al la adreso de Loka Kongresa Komitato (p/a Ĉina Esperanto-Ligo, P.O.Kesto 825, Beijing, Ĉinio), tiel ke la sendaĵo atingu tiun adreson antaŭ la 1a de julio 1986.

La konkursaĵoj (escepte de la infanlibroj) devas esti signitaj per pseŭdonimo; en aparta koverto estu indiko de tiu pseŭdonimo kun nomo kaj adreso de la konkursanto. Se tion permesas la poŝtaj reguloj de la koncerna lando, oni aldonu po 5 ĝuste stampitajn internaciajn respond-kuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkuras. Sur ĉiuj konkursaĵoj estu klare indikita la konkursa branĉo.

Nevalidaj por la Konkursoj estas verkoj aperintaj en presa formo. Ĉiu konkursanto konsentas, ke la rajto pri la unua presigo de premiita verko apartenas al UEA, kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se UEA rifuzas la presigon. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, sed tiu konsentas cedi ĝin senpage okaze de eldono de almanako aŭ antologio de la Belartaj Konkursoj; kondiĉe ke ĝi aperu kun la aprobo de UEA.

La gajnintoj normale legas aŭ legigas la premiitajn verkojn dum aparta kongresa aranĝo. La teatraĵetoj povas esti ludataj aŭ legataj. Oni okazigas ekspozicion de la premiitaj fotoj. Se eble, oni poste publikigas aŭ reproduktas la premiitajn verkojn en *Esperanto* aŭ alia revuo de UEA. Ĉiu premiito ricevas diplomon.

Unua premio 280 gld.; dua premio 196 gld.; tria premio 112 gld.; Premio Luigi Minnaja ĉirkaŭ 300 gld. Premio „Nova Talento” (por la plej bona konkursanto neniam antaŭe premiita) 196 gld. plus enskribo sur la pokalo Henry Harabagiu. Por Infanlibro de la Jaro 588 gld. Por kanto 280 gld. Pacpremio 280 gld.

Recenzoj

Disko de nerompebla sorĉo

Bukedo el la hungara poezio; Poemoj el Hungara antologio, red. Vilmos Benczik (1945), reĝisoris István Iglódi. Budapeŝto: Hungaroton, 1985. 30cm. 33t/m. Du diskoj, duflankaj, stereofonaj. SLPX 13955-56. Prezo: 36,00 gld.

„Poezio estis origine arto ne skriba, sed parola. Poemo vivas ne per literoj, sed per la homa voĉo,” diras Vilmos Benczik en la antaŭparolo. Kaj vere mi konstatis, ke ekludi la unuan diskon signifas esti tuj kaptata per nerompebla sorĉo. Eĉ pli: apud mi sidis lernantino faranta ankoraŭ hezitajn paŝojn en la lingvo, kaj ŝi estis simile katenita de la tembro de la voĉoj, parolantaj kvazaŭ senpere kun konvinka, rava forto. Tion saman oni sentas se oni aŭdas kantiston aŭ aktoron en lingvo al ni ekzota (nur ne la surda angla): tra la lingva baro sentiĝas la potenca ŝvelo de indiĝena patoso; kaj tion oni ankaŭ travivas aŭskultante jenan albumon el 47 poemoj (el kiuj tri kantataj) en modela interpreto de 13 voĉoj, ses virinaj kaj sep viraj, el kiuj kvar (Katalin Berek,



Hungara antologio

György Bánffy, Kálmán Szabó kaj Zsigmond Fülöp) plenumis du trionojn. La teksto de ĉiuj (escepte de du etaj popolkantoj) troviĝas en *Hungara antologio*, 1983. Oni konstatas, ke nenio mankas al iu el la 13 voĉoj: ĉiu (laŭ la esprimo de Kalocsay) „verŝas sin kun varma skand’”; sed se elekti inter eminento, mi plej bone ĝuis Katalin Berek kaj György Bánffy, kun tamen apartaj atutoj por Lajos Németh pro la bravura deklamo de „Metiistoj” de Lajos Kassák, por Athina Papadimitriu pro „Songo de Ĝuang Dzi” de Lőrinc Szabó, kaj Zsigmond Fülöp pro „Anna eterna” de Gyula Juhász.

Kaj ĝuste ĉar la hungaroj vivis dum jarmilo ”en mort-danĝera pordo inter orient’ kaj okcidento,” ilia poezio havis do apartan gravon ĉe la tuta popolo. Dum en Anglio la trubadura kavalirismo regis la poezion inter 14a kaj 19a jarcentoj, en Hungario la temoj de la poezio estis egale vastaj kiel la vivo mem. Kaj tion spegulas ĉi tiu superba albumo.

Eble kvarfoje okazas la elizio ’stas kaj trifoje la prezentanto enŝovis la mankantan -e. Nu, Kalocsay konfesis al mi, ke kelkfoje li mem simple remetis la eliziitan -o dum deklamo.

Kaj fine — ĉar guto da vinagro dolĉigas la manĝon — mi konfesas, ke ĉe „Ho teda pens” de Petőfi mi preferas la unuan tradukon de Kalocsay super la poste reviziita, kiun oni tie ĉi uzis.

Reto Rossetti (Britio)



Pli ol 200 literaturaj pecoj de la plej famaj hungaraj aŭtoroj. Kompilita kaj kun ampleksa enkonduko de Vilmos Benczik.

Eld. Corvina Kiadó, 1983. 448 p. 24 cm. Bindita kun kvar-kolora kovrilo. ISBN 963 13 1625 4.
Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam.
Prezo: 57,00 (por Nederl. 59,85) gld., plus sendokostoj.

”Malmava” festo

Krado-mondo (1974), Encarnación Ferré. El la hispana trad. Fernando de Diego. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 144p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 2 Beletro tradukita 6. Prezo: 45,00 gld.

Esperanto estas lingvo de la espero kaj de la optimismo. *Krado-mondo* estas libro de la malespero kaj de la pesimismo.

Teresa Medina, hispana vilaĝanino, kiu mortigis du homojn, karcerpunita pro la murdo de sia edzo, ŝia dua viktimo, kaj jam loĝinte 16 jarojn en franca malliberejo, ricevas informon, ke ŝia 15-jara filino estas arestita kaj juĝita. Tiu filino povis resti kun sia patrino en la malliberejo nur ĝis ŝi estis 3-jara kaj poste vizitis ŝin nur de tempo al tempo. La patrino pensas pri diversaj gravaj kaj ankaŭ negravaj okazaĵoj en sia vivo. Kiam ŝi estis 11-jara, oni metis ŝian propran patrinon en frenezulejon post la morto de ŝia patro, kaj ŝiaj geonkloj edukis ŝin. Post la perdo de sia lasta revo (pri pli bona estonteco por sia filino), ŝi rigardas la labojn en sia ĉelo por elekti la plej taŭgan pendigumon.

En multaj landoj tia certe duonfreneza virino estus paciento en kuracejo por mensaj malsanulinoj. Mem kruda kaj kruela — ekzemple, ŝi ŝtopas per la fingroj la nazotruojn de sia ĵus naskita filino por konstati, ĉu ŝi jam sentas timon al la morto! — ŝi ne estos simpatia al la leganto, sed oni iom post iom preskaŭ admiras ŝian persistan rifuzon subiĝi al la monotona reĝimo de la malliberejo.

Lingve la traduko ekspluatis la riĉan minon de neoficialaj vortoj en *Plena ilustrita vortaro* kaj *Neologisma glosaro* de Henri Vatré. Tiuj, kiuj preferas *mava* al ”malbona” kaj *dirta* al ”malpura”, ĝuos bonan, eĉ malmavan feston. Tiuj, kiuj preferas simplan vortprovizon, havos ŝancon lerni la novajn radikojn laŭ facila, preskaŭ kursa maniero pro ilia konstanta ripetado en la flua teksto.

Estus interese ekscii, ĉu la vortoj de la originalo de Encarnación Ferré estas vulgaraj aŭ elitaj. El la traduko oni ofte ricevas impreson, ke cenzuristo intence ŝanĝis la sendube simplajn vortojn de la ”heroino”, por ke nur kleraj elitanoj tuj komprenu la tekston.

Abundas en la verko freŝaj vortfiguroj: ekzemple, ”Pli multekostaj krajonoj ne signifas pli belan skribmanieron”; ”Mia filino ignoris min kiel favan katon”; ”Mi ne ramos kiel besto ĉe ies piedoj” en nur kvin linioj! Tiaj esprimoj donas al la verko altan literaturan valoron. Estas facile kompreni, kial la originalo *Hierro en barras* atingis duan lokon en la plej fama literatura konkurso de Hispanio, Premio Planeta.

Gramatike la traduko estas preskaŭ neriproĉebla. Preseraroj nombras malpli ol dek. La tipografio estas alloge bela.

Edward Ockey (Britio)

Ne nur turisma varbilo

40 vidindaj lokoj en Ĉinio. El la angla tradukis Censinio. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 251+19 p. Kolorilus. Mapo. 19 cm. Feniksa Libraro. 12-Es-1825P. Prezo: 9,00 gld.

Partopreni en 1986 la 71an UK en Pekino kaj vidi Pekinon, pri tio verŝajne nemultaj kontentiĝus. Sendube pli granda parto de la partoprenantoj deziros almenaŭ iom konatiĝi kun tiu granda lando, kiu restas al la mondo multrilate nekonata.

Sed estas necese veturi al Ĉinio kun jam preta programo. Fari la programon multe povas helpi la libro *40 vidindaj lokoj en Ĉinio*. Ĝi alproksimigas belegajn lokojn en la naturo, antikvajn kaj pli novajn kulturajn monumentojn, muzeojn, templojn, arkitekturon, arkeologiajn trovaĵojn...

Al ĉiu el la 40 vidindaĵoj estas dediĉita aparta artikolo kun geografiaj, historiaj, kulturaj, teknikaj kaj aliaj informoj, iuj kun plumdesegnaĵo. Krom tio pri 20 el la vidindaĵoj estas allogaj koloraj fotoj, kiuj perfekte pravigas la ĉinan proverbon „Unu bildo valoras mil vortojn”. Sed la libro ne estas nura turisma varbilo. En la artikoloj oni legas ankaŭ interesajn legendojn kaj popolarakontojn, do post la tra-lego oni havas ankaŭ iom da scioj pri la historio de Ĉinio. Ĉe la fino de la libro troviĝas kronologia tabelo de tiu historio kaj indekso de lokaj kaj personaj nomoj, eĉ kun indiko de ilia elparolo.

La lingvaĵo estas klara, afereca, simpla, kia estas konvena por la priskribo de tiel diversfaceta temaro — eĉ se oni tamen povas riproĉi al ĝi iujn neprecizaĵojn. Bonŝance eraroj ne estas multaj. La teksto, salutinde, estas plejparte verkita en mallongaj, simplaj frazoj.

Ĉi tiu libro estas pruvo pri tio, ke la ĉinaj esperantistoj serioze klopodas ebligi, ke la veturo al Ĉinio kaj partopreno en la 71a UK fariĝu por ĉiu kongresano profunda travivaĵo. Ĝi nepre estas tre utila helpilo — eĉ por tiuj, kiuj vizitos nenium el la proponitaj vidindaĵoj, ĉar traleginte la libron, ili eks-cios multon ĝenerale sciindan.

Eduard V. Tvarožek (Ĉeĥoslovakio)

Salteto antaŭen

Nomaro de britaj birdoj/British Bird Names, komp. Edward Ockey (1913). Banstead: Mondlingvaj libroj, 1985. 15 p. Mimeo. 21 cm. Prezo: 3,00 gld.

Temas pri komunlingvaj nomoj de birdoj troveblaj en la brita insularo, ordigitaj laŭ la anglalingva nomo, kun la grek-latina scienca nomo kaj adekvataj tradukoj en Esperanto; la franca kaj la germana. Entute, do, ni havas kvinlingvan komparon.

La normo por eŭropaj birdnomoj en Esperanto estas la terminaro *Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj* (1971) de la Nomenklatura Komisiono de

Ornitologia Rondo Esperantlingva. Tion la aŭtoro plejparte sekvis, foje plibonigis (pintvosta anaso anstataŭ pintvostanaso kaj similajn) kaj krome aldonis almenaŭ unu specion (sovaĝan domkolombon aŭ urbokolombon) kaj interesan kolekton da vulgaretoj aŭ farmbienaj vortoj.

Malnovaj esperantistoj supozeble devas rezignacie akcepti la malaperon de la palumbo, cipselo, frugilego, parvolo kaj akcentoro. Malaperon, tio estas, ne de la birdoj mem, feliĉe, sed de la nomoj! Ĉar ili nun fariĝis ringokolombo, apuso, kampokorvo, troglodito kaj pronelo. Malpli akceptebla el scienca vidpunkto estas, ke monedo kaj rubekolo fariĝu korveto kaj ruĝ-gorĝulo, ĉar eĉ inter komunlingvaj nomoj devas ekzisti ia singardemo kontraŭ nenecesa duigo de terminoj. Kiom da centoj da birdospecioj tra la tuta mondo kvalifikiĝus por la nomoj korveto aŭ ruĝgorĝulo? Mi krome ne akceptus kiel definitivajn terminojn la nomojn molanaso, grenokanbirdo, kangrilbirdo; diversmaniere ili simple ne konformas al akceptitaj normoj de vortokunmetado.

Mankas antaŭparolo de la aŭtoro, en kiu li klariĝus, ekzemple, al kiu la verko estas celita. Ĉu nur al anglalingvaj britaj esperantistoj? Kial, do, tiom da laboro por doni tradukojn en la franca kaj germana lingvoj? Aŭ ĉu celita ankaŭ al germanoj kaj francoj? En tiu kazo la laboro ankoraŭ ne estas finita, ĉar urĝe necesas reordigi la terminojn laŭ internacie rekonita vicordo kaj provizi la verkon per indekso por ĉiu el la kvin lingvoj.

John Rapley (Nederlando)

Povi pravigi nian agadon

Lingvo kaj komunikado – fundamentaj prelegoj kaj artikoloj, div. aŭtoroj. Rotterdam: Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, 1984. 41p. Mimeo. 21cm. Prezo: 6,00 gld.

Potenco estas kuko, politiko estas la arto partumi ĝin. Ĉiu volas ne nur sian parton, sed pli, kaj strebas malhelpi aliajn havi sian. Ne gravas, ĉu la kuko grandas aŭ ne: esenca plezuro ĉe potenco estas ekskluziveco.

Lingvo estas potencero: uzu mian lingvon, subiru mian regon. Same la komunikiloj: uzu mian komunikilon, uzu mian lingvon.

Libero estas eblo disponi propran potencon – do ĉi-kuntekste propran lingvon. Ĝin oni nomas ankaŭ rajto.

De dek kvin jaroj TEJO okupiĝas pli-malpli aktive pri ĉi tiu temo. Kaj ĉi tiu libro provas mallonge prezenti la temon kaj la nunan staton de prilingva teorumado flanke de ĝia Komisiono pri Eksteraj Rilatoj.

Niaj delongaj teoriistoj, kiel Michel Duc Goninaz kaj Hans Bakker, kunlaboras ĉi tie kun novuloj (feliĉe daŭre venas), kiel Yvo Peeters, Sándor

Révész, kaj forpasinta Jean-Paul Marmin. Ne nur teoriistoj, cetere, sed ankaŭ aktivistoj sur diversaj niveloj.

Michel Duc Goninaz komparas komunikadon nelokan kaj lokan. Cetere, li uzas esprimojn "rajto je komunikado" por la unua, kaj "lingva libereco" por la dua. Miaopinie "rajto" kaj "libero" esprimas saman nocion: eblo disponi pri potenco. Je unu nivelo temas pri la eblo komuniki vaste: intergrupe, internacie. Tio ĉi sensencas sen intergrupa esprimilo. Sur alia nivelo temas pri eblo uzi lokan parolformon. Duc Goninaz demandas, kiom ĉi tiuj ebloj kontraŭas sin. Evidente, teorinivele, nenio malhelpas ambaŭ; reale, la naciaj lingvoj emas forigi la lokajn, kaj la intergrupaj (t.n. "internaciaj") riskas provi la samon sur sia nivelo.

Hans Bakker agnoskas tiun ĉi realon: "mondo... malbona pro miopeco, pro intereso, kaj ĉefe: pro interesiĝo nur pri propraj interesoj." Peeters interesiĝas ĉefe pri memdecido, Marmin pri la specialaj problemoj de gastlaboristoj, Révész pri amaskomunikado.

Kiel esperantistoj, ni ŝuldas al ni okupiĝi aŭ almenaŭ informiĝi pri ĉi tiuj temoj. Fronte al nia dua jarcento, ni devos povi pravigi nian agadon ne nur al ni mem, sed ĉefe al la ekstera mondo – mondo, kiu ne multe interesiĝas pri belaj sonĝoj, sed pri praktikaj realoj. Tie kuŝas la intereso de ĉi tiu libro, ĉar la plimulto de la homoj neniam pensis pri ĉi tiu aspekto de la homa vivo, kaj ignoras la ekstreman gravon de la lingvo en la daŭra strebo al potenc-ekvilibro.

Rikardo Cash (Francio)

laste aperis...

Akvon, mi petas! El la japana trad. Hukuoka Esperanto-Societo. Hukuoka: la tradukintoj, 1984. 64p. Ilus. de Nakamura Ai. 21cm. Raportoj pri la nukleaj atakoj kontraŭ Hiroshima kaj Nagasaki. Prezo: 10,50 gld.

Albert Schramm (1880-1937) kaj lia korespondado kun Lazaro L. Zamenhof (1859-1917), Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985. 59p. Ilus. 21cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 3. Kun faksimiloj kaj bibliografio. Prezo: 15,00 gld.

Biografio de duona vortaro; Kial Esperanto perdis sian gvidantan Esperantologon, Hans Joachim Plehn (1905-1985). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985. 11p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 12. Prelego pri la historio de *Enciklopedia vortaro Esperanto-germana* de la esperantologo Eugen Wüster (1898-1977). Prezo: 6,00 gld.

Curset d'Esperanto, Pere Saumell i Vila. Manresa: la aŭtoro, 1985. 84p. Ilus. 22cm. Katalunlingva lernolibro por kursoj. Prezo: 18,60 gld.

28 kanzonoj kaj himnoj. Lisbono (ne indikita): Portugala Esperanto-Asocio, 1985. 28p. Mimeo. 21cm. Ĉefe portugalaj kaj alilandaj kantoj en Esperanto. Prezo: 1,20 gld.

Eliksiro lopeluna (1984), A. López Luna (1914); komp. A. Hryniewicz. Bonaero: Amigos de López Luna, 1985 (2a eld.). 206p. Mimeo. 22cm. Bind. ISBN 950 43 0304 8. Antologio de verkoj de López Luna. Prezo: 67,50 gld.

El la verkoj de E. Lanti; 3. Laroque Timbaut: Laŭtel!, 1985. 120p. Mimeo. 21cm. SAT-Broŝurservo. Artikoloj, paroladoj kaj leteroj (1937-46) de la fondinto de la sennaciismo. Prezo: 9,00 guldenoj.

Esperanto – van reageerbuis tot moedertaal, A. de Jong. 22p. Ilus. de C. Spannenburg. 18cm. Lelystad: Stichting IVIO, 1985. Nederlandlingva informbroŝuro, unuavice por lerneja uzo. Prezo: 2,40 gld.

Florence Nightingale, A. da Silva. El la portugala trad. E.

Padrão. Famalicão: la tradukinto, 1985. 27p. Ilus. Mimeo. 21cm. Kajero 9. Biografio pri la brita flegistino (1820-1910). Prezo: 2,10 gld.

Horizonto de soveta Litovio, red. O. Deveikienė k.a. Vilnius: Mintis, 1985. 56p. Ilus. Muziknotoj. Mimeo. 29cm. 8a kajero. Kolekto de diversaj beletraĵoj kaj artikoloj i.a. pri aspektoj de la vivo en Litovio. Prezo: 3,00 gld.

Goeto, Agostinho da Silva. El la portugala trad. Eduardo Padrão. Famalicão: La tradukinto, 1984. 23p. Ilus. Mimeo. 22cm. Kajero 8. Biografio pri la germana verkisto Johann W. von Goethe (1749-1832). Prezo: 1,50 gld.

Jen iras Lazaro! Tokio: Stafego, 1985 (ne indikita). 40p. Ilus. 18cm. Seksaj ŝercoj. Prezo: 8,40 gld.

Kantoj kaj romancoj en Esperanto por gitaro; Albumo 1, Dragan Štokić. Trad. Zvonko Rehoříć. Zagrebo: la redaktinto, 1983 (2a, tralaborita eld.). 4+44p. 17cm. Sesdek jugoslavaj kantoj, kun muziknotoj kaj gitarakordoj. Prezo: 15,00 gld.

Kelkaj floroj Esperantaj; Agrablaj legaĵoj kun multaj ilustraĵoj (1903), A.-J. Witteryck (1865-1934). Wilrijk: Sonorilo, 1985 (2a eld.). 24p. Ilus. 21cm. Represo de ŝerclibreto. Prezo: 6,30 guldenoj.

Kion travivis aŭstria familio en la brazila praarbaro, kie ĝi laboris kiel koloniistoj, Erika Linz (m.1984). Gerlingen: Eldonejo Bleicher, 1985. 196p. Ilus. de E. Sona. 21cm. Tridek unu rakont-leteroj pri 36 jaroj en brazila entrepreno, kvazaŭ antaŭulo de "Bona Espero"; kun glosaro. Prezo: 27,00 gld.

Kor(r)espondu Esperante/Skriv brev på esperanto, Inga Johansson kaj Åsa Sahlquist. Stokholmo: Posten, 1985. 128p. 19cm. Ilus. ISBN 91 86376 01 2. Mikspoto de mallongaj tekstoj en Esperanto kaj la sveda por informi, instrui kaj instigi al letterskribado. Prezo: 7,20 gld.

Language Problem in Tourism, The. Rotterdam: UEA, 1985. 24p. Ilus. 21cm. ED-34A. Prezo: 3,00 gld.

Lastaj estas lastaj, La (1966), Aldo Onorati. El la itala trad. G. Lacertosa. Venecio: Mestrina, 1985. 96p. 22cm. Aŭtobiografia romano de provizora instruisto. Prezo: 20,70 gld.

Laŭ la sendevia kurso de la paco kaj progreso, M.S. Gorbačov (1930). El la rusa trad. L. Novikova kaj V. Arolovič. Moskvo: Novosti, 1985. 31p. Ilus. 17cm. Parolado; kun biografio. Prezo: 1,20 gld.

Lernu kantante, Sylla Chaves (1929). Rio-de-Janeiro: Liga Brasileira de Esperanto, 1985. 63p. Ilus. de K. Teodoro. 23 cm. Facila legolibro kun kantoj kaj prozaĵ, i.a. socikritikaj, uzanta 1 500 radikojn: la lasta ero en la kolekto "Lernu kantante"; kun aparta laŭpaĝa vortareto Esperanto-portugala. Prezo: 9,60 guldenoj.

Lingva problemo en turismo, La. Rotterdam: UEA, 1985. 20p. Ilus. 21cm. ED-22E. Prezo: 3,00 gld.

Masaryk, A. da Silva. El la portugala trad. E. Padrão. Famalição: la tradukinto, 1985. 36p. Ilus. Mimeo. 21cm. Kajero 10. Biografio pri la ĉeĥa filozofo kaj politikisto (1850-1937). Prezo: 2,70 gld.

Med Esperanto i Helsingborg, komp. Sven Möllestad. Helsingborg: Helsingborgs Esperantoförening, 1985 (ne indikita). 16p. Ilus. 21cm. Bele prezentita svedlinga historio pri la Esperanto-societo de Helsingborg. Prezo: 4,50 gld.

Nova paradigmo en psikologio, La, Ruben Feldman Gonzalez. El la hispana trad. N. Kalusky k.a. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais, 1985 (ne indikita). 259p. 21 cm. SAT-Broŝurservo. Prezento de koncepto pri unueca perceptado, devenanta de holografio kaj holokinetiko. Prezo: 15,60 guldenoj.

Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo, La, Germain Pirlot (1943). Rotterdam: UEA, 1985 (6a, ĝisdata eld.). 32p. Grafikaĵo. 21cm. ED-20E. Prezo: 3,00 gld.

Aŭkcio de historiaĵoj

UEA vendas aŭkcio jenajn duoblaĵojn el sia biblioteko:

1. **Literaturaj aldonoj de Lingvo Internacia**, j. 1904, 181p. kaj 1905, 280p. Kune broŝurita. Broŝuraĵo malligiĝinta sed facile rebindebla.
2. **Lingvo Internacia**, j. 1905, p. 285-428 kun p. 145-216 de Lit. aldono kaj j. 1906, p. 1-456. Tole kunbindita.
3. **Lingvo Internacia**, j. 1907 kun Lit. aldono, 572 + 207p. Tole bindita.
4. **Lingvo Internacia**, j. 1908, p. 289-592, kaj j. 1909, p. 1-288. Tole kunbindita.
5. **Lingvo Internacia**, j. 1909, 584 + 12p. Tole bindita.
6. **Holanda Esperantisto**, j. 1931, 420p. Bindita.
7. **Esperantologio**, 2 vol., 6 n-roj. Kompleta kolekto.
8. **Tra la Esperanta literaturo**, Luigi Giambene. Romo 1907, 112p.
9. **Fortoj de l' vivo**, Vilho Setälä. Helsinki 1967, 208p., broŝ. Kun aŭtora dediĉo al F. Faulhaber.

Ofertoj devas atingi UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, plej malfrue la 20an de decembro. Sufiĉas mencio de la numero de la aŭkcio. Efektivaj sendokostoj aldoniĝos (minimume 5 gld.). Petu ankaŭ nian novan liston de brokantaĵoj kun pli ol 400 titoloj.

Perkomputila instruado, red. Péter Broczkó kaj Ilona Koutny. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio/Scienca Eldona Centro de UEA, 1985. 64p. Ilus. 24cm. N-ro 6 de *Internacia komputado*. ISBN 963 571 151 4. Popularaj artikoloj i.a. pri instruistoj kaj mikrokomputiloj; kun mallongaj novaĵoj. Prezo: 7,50 guldenoj.

Principoj por elekto de matematikaj kaj stokastikaj terminoj en Esperanto, Olav Reiersøl. Oslo: Universitato de Oslo, 1985. 40p. 30cm. ISBN 82 553 0583 1. Kun bibliografio kaj alfabeto indekso de terminoj. Prezo: 12,00 gld.

Skizo pri personeco de esperantisto (pri ĝia virtuala evoluo), Tyburcjusz Tyblewski (1933). Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1985. 68p. Ilus. 20cm. ISBN 83 7013 019 4. Psikologia studo pri esperantisteco; kun bibliografio. Prezo: 9,00 gld.

Sur flugiloj de trobo kaj de Esperanto/Nas asas da trova e do Esperanto, Válder Francini (1926). San-Paŭlo: la aŭtoro, 1984. 126p. 21cm. Dulingva: Esperanta-portugala. Pri la poemspeco "trobo" aŭ "kvarverso", kun originalaj kaj tradukitaj ekzemploj. Prezo: 6,00 gld.

Tago de la senaeriĝo, La (1947), Masaĵi Iŭakura (Iwakura Masazi, 1903). El la japana trad. Sejŝro Nomra. Numazu: Kolombro, 1985. 86p. Ilus. 19cm. Du noveloj. Prezo: 8,40 guldenoj.

Vocabolario esperanto-italiano, Umberto Broccatelli. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1984. 16+482p. 22cm. Esperanto-itala vortaro kun preskaŭ ĉiuj radikoj de *Plena ilustrita vortaro*; kun konciza prezento de la gramatiko. Prezo: 57,00 gld.

World Communication Year: Social and Linguistic Aspects of Modern Communications. Rotterdam: UEA, 1985. 16p. 21cm. ED-33A. Prelego de Richard E. Butler, ĝen. sekretario de Internacia Telekomunika Unio, en la 68a UK kaj la respondo de d-ro Humphrey Tonkin. Prezo: 3,00 gld.

Diversaĵoj:

Bulgara rozo, Ĵana Cikalova. El la bulgara trad. K. Vâlev. Sofio: Balkanton, 1985. 31cm. 33t/m, duflanka, stereofona disko. BTA 11659. Dek kvin kantoj el la bulgara. Prezo: 24,00 guldenoj.

Jubilea koncerto, Veselin Damjanov. Sofio: Balkanton, 1985. 31cm. 33t/m, duflanka, stereofona disko. BOA 11569. Sep popularaj operaj kaj operetaj arioj kaj sep originalaj kantoj; kun tekstoj. Prezo: 24,00 gld.

Voĉo de la popolo; Almelo kantas en Esperanto. Almelo: Esperanta Grupo, 1985. Kaseto kun naŭ kantoj, inkl. de "La espero", "La vojo" kaj "La internacio"; kun presita tekstfolio. Prezo: 17,10 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

Kontribuojn sendu al la ĝenerala sekretario de TEJO: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

Agado okaze de IJJ

Baldaŭ finiĝos la Internacia Junulara Jaro (IJJ) proklamita de UN por 1985. Kion UEA faris por sia junularo? Ĉefe, la Komitato adoptis en Aŭgsburgo, kaj preskaŭ unuanime, novan regularon de TEJO, kiu pli klare montras la ĝustajn lokon kaj rolon de TEJO sine de UEA. Mi devas konfesi, ke kiel estrarano pri junularo mi persone engaĝiĝis en la debaton kaj definitivan akcepton de la regularo fare de la Komitato. De la komenco ĝia alprenado devis esti, laŭ



Informbudo pri prizorgis B. Despiny kaj E. Schwarzer en Barcelono.

mi, ĉefa ago de la Asocio kadre de IJJ. Kial? Tutsimple, ĉar unu el tri subtemoj de la Jaro estas „Partopreno”. Kiel pli bone partoprenigi la junularon en la vivo de la movado, se ne donante al ĝi iom pli da respondeco kaj sendependeco? Kaj tia ĝuste estas la ĉefa celo de la nova regularo. Nun al TEJO apartenas la tasko montri al la plenkreska movado, ke ĝi estas serioza kaj respondeca organizo.

Du aliaj subtemoj de Internacia Junulara Jaro estas „Evoluo” kaj „Paco”. UEA kaj ĝia junulara sekcio aktive partoprenis ĉefajn mondajn eventojn, kie oni vigle diskutis ĉiujn tri temojn. Unu el ili estis la Unesko-kongreso pri junularo, okazinta en Barcelono inter la 8a kaj 15a de julio 1985. Ĝi efektive estis nur kongreso *pri* la junularo kaj ne *de* la junularo. Sekve, la ĉeestantaj gejunuloj devis pacience aŭskulti longajn registarajn monologojn pri la per-

fekta situacio de la junularo en iliaj landoj, kaj absolute kondamninda en aliaj... Nur de tempo al tempo ili sukcesis menciigi la verajn problemojn de la junularo en la mondo, kiuj tamen perdiĝis en la monologa maro.

Viaj reprezentantoj tie (akompanis min Elisabeth Schwarzer, estrarano de TEJO pri eksteraj rilatoj) tamen ne bedaŭras sian ĉeeston en Barcelono. Helpitaj de junaj katalunaj esperantistoj ni organizis sufiĉe imponan budon pri Esperanto kaj ties movado. Abunda materialo disdoniĝis dum tuta semajno. Dufoje mi tamen sukcesis interveni dum la kunvenoj: unue, por plendi kontraŭ la malfido ekzistanta en la Tria Mondo kontraŭ ĉio, kio ŝajnas tro ‘eŭropeca’ (alude al niaj problemoj en kelkaj afrikaj landoj) kaj due, por protesti kontraŭ daŭra neglekto al neregistaraj junularaj organizoj sur nacia kaj internacia niveloj. Kiel kutime, la plej interesaj kaj fruktodonaj interparoloj estis ‘koridoraj’ kontaktoj kun ŝtataj kaj neŝtataj reprezentantoj.

En la fino valoras aldoni, ke jam de 1984 UEA prezidis ĉe Unesko la laborgrupon pri IJJ, kiu preparis valoran raporton por la kongreso en Barcelono, kies konkretaj proponoj estos transdonitaj al la Sekretariato de Unesko.

Barbara Despiny

Eta kvizo pri kontakto

1. La nombro de pagintaj ricevantoj por *Kontakto* meze de oktobro 1985 estas:

a) 804 b) 1 804 c) 2 804 ĉ) neniu el tiuj.

2. Kompare kun la nombro antaŭ tri jaroj, tio estas:

a) malpli ol la duoblo b) pli ol la duoblo
c) apenaŭ la kvarono ĉ) neniu el tiuj

3. 70% de la individua membraro de UEA loĝas en Eŭropo. Nur 54% de la pagintoj por *Kontakto* loĝas tie. Post Eŭropo, kiu kontinento havas la plej grandan proporcion de pagintoj?

a) Azio b) Ameriko c) Afriko ĉ) Oceanio.

4. El la sekvontaj, kiu ne estas temo por *Kontakto* en 1986?

a) Akvo b) Ĥ c) Ĉinio
ĉ) Revivigo de lingvoj kaj de etnaj kulturoj
d) Morto e) Arto kaj literaturo.

5. Kiu jubileo alvenos plej frue?

a) La Centjara Jubileo de Esperanto.
b) La centjariĝo de la plej juna redaktoro de *Kontakto*
c) La apero de la centa numero de *Kontakto*.

Eŭropa Junulara Semajno en Strasburgo

De la 1a ĝis la 6a de julio okazis en Strasburgo (Francio) Eŭropa Junulara Semajno, kiel aranĝo en Internacia Junulara Jaro (IJJ). La temoj de la Semajno estis vivstilo, paco kaj evoluo, rasismo kaj maltoleremo, instruado kaj la mondo de laboro. Ni publikigas la artikolon de Thomas Kolb (FR Germanio), kiu tie reprezentis TEJO.

Jam en la 70aj jaroj Eŭropa Konsilio havis la ideon inviti la junularon de siaj membroŝtatoj por interŝanĝi opiniojn. Sed tio realiĝis nur en julio ĉijare per kunlaboro de Eŭropa Junulara Centro. Oni invitis pere de junularaj asocioj, kiel ekz. de Ruĝa Kruco, Naturamikoj, junaj sekcioj de politikaj partioj, TEJO ktp., kio venigis ĉirkaŭ 1 600 homojn ĝis 26-jarajn.

En la unua tago la granda ovo el plasto, lokita antaŭ la sidejo de Eŭropa Konsilio, simbolanta la Semajnon, rompiĝis kaj elflois miloj da balonoj. Dum la sekva bufedo oni havis okazon konatiĝi en la ĝardeno de la kastelo Pourtalès. Bedaŭrinde la diversaj naciaj grupoj apenaŭ miksiĝis. Jam tie mi devis konstati, ke temas pri tute alia afero ol Esperantujo.

En la dua tago ni komencis la diskutgrupojn. Mi elektis tiun pri „Drogoj, alkoholo, tabako”. Unue, konsiliano raportis pri tiu fako. La dua parto estis pli interesa, ĉar oni dispartigis la tro grandan 60-personan grupon kaj okupis la malgrandajn grupojn per diskutdemandoj. Nia grupo havis la temon „Kial gejunuloj misuzas drogojn?”. Ni devis difini la vorton „misuzi”. Poste ni trovis ses respondojn, kiuj dependas de la nacia kulturo: tradicio, ĝuo, ekscito, scivolemo, socio kaj problemoj. Bedaŭrinde mi neniam ricevis respondon de la fakulo pri konkretaj agoj de Eŭropa Konsilio por solvi la problemojn lerneajn, sociajn, senlaborecajn ks., kiuj multkaze estas la motivoj por misuzi drogojn. Post ĉiu diskutgrupo okazis forumo, en kiu la grupoj prezentis siajn konkludojn.

La dua diskutgrupo, kiun mi partoprenis, temis pri la laboro de la Kortumo por Homaj Rajtoj. En Palaco de Homaj Rajtoj, apud Palaco de Eŭropo, oni enuigis nin en kvarhora kunsido sen gvidlinio. Unuopuloj rajtis demandi kunlaboranton de la Kortumo, kaj tiu respondadis, distance, sendetale kaj nerekte. Multaj homoj forlasis la ejon antaŭ la fino. La greka delegacio foriris jam en la komenco, ĉar turko gvidis la kunsidon.

La Semajno devus esti okazo por interŝanĝi opi-

niojn, sed dum ĝi ni eksciis, ke ĝi estu bazo por la konferenco de ministroj pri junularaj aferoj, okazonta en novembro. Mi min demandis, ĉu la organizita junularo, kiu venis al Strasburgo, povas esti reprezenta? Ĝi estas nur 3 % de la junularo de okcidenta Eŭropo. Krom tio, la opinioj prezentitaj en Strasburgo estis plejparte antaŭpreparitaj de politikaj partioj, kiuj uzis la konferencon por siaj celoj.

La partoprenantoj venis el la 21 landoj de Eŭropa Konsilio plus observantoj el kelkaj aliaj landoj. Kompreneble, tio kaŭzis lingvajn problemojn. La diskutoj estis en la angla kaj franca, ĉiam kun rekta interpretado. Tamen, sufiĉe da homoj ne kapablis paroli en tiuj lingvoj. Ofte mi sentis min ne samranga kun la denaskaj angle- kaj franceparolantoj. La germana televido ZDF parolis pri „babela lingvomalordo”. Multaj homoj hejmenveturis mal-kontentaj.

Thomas Kolb

TEJO en EJC denove



Pli lastatempe – inter la 6a kaj 12a de oktobro – TEJO denove vidiĝis en la Eŭropa Junulara Centro. Ne por propra seminario, sed ĝuste laŭinvite por gvidi Esperanto-kurson en seminario de la Eŭropaj Junaj Kristan-Demokratoj. Gvidanto de tiu movado vidas en Esperanto manieron venki la lingvajn problemojn en la internacia laboro, kiujn ekzemple ĉi-julie spertis ilia delegacio al la Junulara Festivalo en Moskvo.

La kurso, sub gvido de Stefan MacGill, okazis dum 90 minutoj en 5 sinsekvaj vesperoj; sur la foto vi vidas tri el la dek sep partoprenintoj. La ĉ. 70 gastoj de la Centro dum tiu semajno havis la okazon rigardi ampleksan ekspozicion apartenantan al la orienta federacio de UFE.

La kursanoj havis bonan lingvoscion kaj progresis rapide, sed inter la aliaj seminarianoj troviĝis iuj, kiuj ja spertis lingvajn problemojn, similajn al tiuj aluditaj en la supra artikolo. Ekzemple, pri peza politik filozofia temo prelegis italo france, interpretiĝis anglan, kaj tion aŭskultis ĉ. 20 el la 30 junuloj, sed nur 3 el tiuj estis denaske anglalingvaj.

Kalendaro

Tutjare

Kursoj, turismaj kaj kulturaj aranĝoj, Varna kaj Smoljan (Pisanica), Bulgario (Internacia Esperanto-Kursejo, Pk. 791, BG-1090 Sofia).

Internacia Feria Altlernejo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds) organizas kursojn, studsemajnojn ks. Gastejo Edmond Privat ebligas tutjaran feriadon.

Internacia Esperanto-Lernejo en Bydgoszcz kaj Toruń, kaj aliaj turismaj aranĝoj, Pollando (Esperantotur, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-35-094 Bydgoszcz).

Turismaj semajnaj restadoj en Istanbul kaj Bursa, Turkio (Matur Turizm, Esperantaj servoj, İnönü Caddesi 15/1, Bursa).

Unu- kaj dusemajnaj flugoj Belgio-Bulgario (Esperantotur Benelukso, Schotlandstraat 73, B-1060 Bruselo).

Novembro

23-24 3a Internacia Kanzon-Teatra Festivalo, Parizo, Francio (UFE, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)

29-01 dec. Novembra Junulara Festivalo, Ozren, Jugoslavio (Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Vase Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo)

Decembro

06-08 Kultura Semajnfino, Homburg/Saar, FR Germanio (SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)

13-14 4a Konferenco de CED pri Lingvo kaj Komunikado, Novjorko, Usono (D-ro H. Tonkin, President, State University College, Potsdam, NY 13676)

15-20 Vintro en Ora Prago, Ĉeĥoslovakio (ĈEA, Jilská 10, CS-110 01 Praha 1)

27-04 jan. Skiferiado, La Chaux-de-Fonds, Svislando (vd. supre sub Tutjare)

27-04 jan. 29a Internacia Seminario, Eschwege, FR Germanio (Germana Esperanto-Junularo, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1)

27-04 jan. 2aj Sanmarinaj Universitataj Semajnoj, San-Marino (Prof. H. Frank, Kleinenberger Weg 16, D-4790 Paderborn, FR Germanio)

30-01 jan. Novjaraj Skitagoj en Olimpika Montaro, Pale, Jugoslavio (Esperanto-Ligo de Sarajevo, Vase Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo)

31-02 jan. Novjaro en Pale, Jugoslavio (vd. 30 dec.)

1986 Marto

14-16 Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo, Leipzig, Germana DR (IFER '86, Distrikta Estraro de Kulturligo de GDR, Käthe-Kollwitz Str. 115, DDR-7010 Leipzig)

28-31 70a Brita Kongreso de Esperanto, Loughborough, Britio (S-ino S. Folkard, 20 Great Central Road, Loughborough, LE11 1RW)

28-01 apr. Internacia Konferenco pri Esperanto-Propagando, Vraca, Bulgario (P.k. 66, BG-3000 Vraca)

31 Limdato de la Belartaj Konkursoj de UEA. Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas.

28-31 Paska kunveno en Nederlando, Someren (S-ino D. Derksen, Wagnerplein 238-2, NL-5011 LZ Tilburg)

Aprilo

04-09 Internacia Scienca Seminario "Jurij Gagagin", Vraca, Bulgario (Bulgara Astronaŭtika Societo, P.k. 279, BG-3000 Vraca)

11-13 Skota Esperanto-Kongreso, Newbattle Abbey College, Edinburgh, Britio (R. Calder, 92 Liberton Brea, Edinburgh, EH16 6LB)

Majo

09-15 Internacia Foiro de Esperanto-Kulturo, Zielona Góra-Raculka, Pollando (J. Rządzy, ul. Krośnieńska 3 B/15, PL-65-001 Zielona Góra; F. Kruse, Mathildenstr. 73, D-2800 Bremen, FR Germanio)

14-20 Eŭropa Semajno, Hamburgo, FR Germanio (S-ino E. Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80)

16-20 88a Franca Kongreso de Esperanto, Gérardmer, Francio (UFE, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)

23-29 Internacia Esperanto-Konferenco "Internaciismo de Hristo Botev kaj Nia Nuntempo" + Konkurso, Vraca, Bulgario (Esperanto, P.k. 66, BG-3000 Vraca)

17-23 38a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, Skopje, Jugoslavio (IFEK-Kongreso, p/a Ferotrist, Pf. 270, str. "K.J. Pitu" bb., YU-91000 Skopje)

Junio

27-30 28a Kanada Kongreso de Esperanto, Otavo, Kanado (PO Box 801, station "B", Ottawa, Ontario, K1P 5P9)

Esperanto en radio

Pola Radio dum la pasinta somero festis la kvinmilan korespondaĵon ricevitan en 1985 kaj la naŭdekmilan ricevitan en la tuta historio de la elsendoj. La skribintoj ricevis premion.

En novembro aperas nova program-informilo, senpage havebla, same kiel la konsilaro *Kiel aŭskulti pli bone*. Duonhora programo estas daŭre dissendata sesfoje ĉiutage inter 05h30 kaj 23h00 (vidu tabelon en la maja numero de la revuo, paĝon 100). Inter la diversaj rubrikoj ni citu la kulturan, sportan, scienc-teknikan, koncerton kun bondeziroj, „Pollando hodiaŭ”, „Panoramo de internaciaj eventoj”. Nova eksperimenta formo de prezentado, pli viva, konsistas en libera interparolo de la geredaktoroj.

La stacio deziras disvolvi la kunlaboron kun la Esperanta gazetaro, same kiel la kontakton kun aŭskultantoj, kiuj estas invitataj proponi konkretajn temojn sur aparta paperfolio.


Krome, la redakcio de la stacio deziras kolekti materialon pri la agado por la Centjara Jubileo de Esperanto por rapida diskonigo. Adreso: Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Skrytka 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

NUDPIEDA GEN

La fama kontraŭmilita bildstria romano en mirinde flua esperanta traduko kaj bonega teknika prizorgo.

Nudpieda Gen (1973), Keizi Nakazawa (1929). Eljapanigis Yukio Izumi. Tokio: Rondo Gen, 1985 (2a eld. reviziita). 4+284p. Bildstria romano. 21cm. Prezo: 30,00 gld., plus sendokostoj. Mendebla ĉe: UEA, JEI, KLEG.

Premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA kiel "Infanlibro de la Jaro 1982"



Loke

● **Belgio:** Pasintjare Asocio por Esperanto sendis la tiam ĵus eldonitan diskon de Nicole Pairoux, kantistino el Namur, al kvin oficejoj de RTBF (belga francalingva radio-elsendo), per kiu ili plurfoje aŭdigis. Post programo pri lingvinstruado, en kiu ok esperantistoj aldonis siajn opiniojn, alia radio-redakcio, kiu pli frue aŭdigis la diskon, krome intervjuis s-inon L. Drèze dum 25 minutoj.

● **Britio:** Jubilea Esperanto-Fonduso Norwich, nun en sia dekoka jaro, havas kapitalon de pli ol 29 mil pundoj (122 380 guldenoj). El la rento la fonduso subvenciis dum 1985 studojn kaj vojaĝojn de junaj esperantistoj je 1 240 pundoj (5 233 gld.). Parto de la premioj venas el specialaj memorfondusoj. Du

novaj memorfondusoj estas je la nomoj de Edwin Dean (1900-1985), fondinto de Jubilea Esperanto-Fonduso Norwich, kaj de s-ino Nancie Durham (m. 1985). El Premio Ĉinio-Nancie Durham venontjare venos premio de mil pundoj (4 220 gld.), por ebligi al junul(in)o partopreni la Universalan Kongreson en Pekino.

● **Pollando:** La septembra Esperanta feriado „Ora Pola Aŭtuno” en Miedzygórze allogis 520 partoprenantojn. En la programo estis tri diversgradaj kursoj.

● **Sudafriko:** Post mallonga reklamado pri Esperanto en lokaj ĵurnaloj kaj per la tutnacia radioservo, la teknika altlernejo de Port Elizabeth oficialigis Esperanton kiel memstaran subtenan studobjekton. La kurso, la unua oficiale akceptita en la lando, komenciĝis la 4an de septembro kun 25

lernantoj. Iu ĵurnalo aperigis du kontraŭstarajn leterojn, sed la multaj favoraj reagoj poste publikigitaj kreis pli da entuziasmo kaj aliĝoj. La lekciisto estas Cobus Zeelie, docento pri farmacio kaj redaktoro de la organo de Sud-Afrika Esperanto-Asocio *Bona Espero*. La kandidatoj en la nova naŭ-monata kurso devas skribi kaj buŝe ekzameniĝi por akiri Atestilon pri Esperanto. Pro la entuziasmo pri la kurso oni jam planas duan kurson ekde januaro.

Fake

● **Dulingvismo:** En junio aperis nova anglalingva revuo, kiu titoliĝas *Second Language Research* (Esplorado pri dua lingvo). Kvankam ĝi sendube estas serioza fakrevuo — anglalingva, ĉar preparata en Nederlando! — ĝiaj motivoj, aŭ eventuale grado de informiteco,



Venezuelo: La lernantoj de la unua Esperanto-kurso en San Carlos del Zulia, 400 kilometrojn sude de Marakajbo, fondis la novan Esperanto-klubon "D-ro Jesus Enrique Lossada", kontakteblan tra Zulia Esperanto-Asocio, Calle 79, No. 3C-72, Maracaibo-4002, Venezuelo.

estas suspektindaj, ĉar ĝi estas organo de Instituto por la Angla Lingvo-kaj Literaturscienco de Universitato de Utreĥto. La revuon eldonas Edward Arnold Ltd., Journals Dept., 41 Bedford Square, London WC1B 3DQ, Britio.

● **Farmacio:** Jam dek jarojn aperas en la hungara monata fakrevuo *Gyógyszerészet* (Farmacio) Esperantaj resumoj de ĉiuj kontribuoj. La redakcio volas disvastigi la informon por konvinki pliajn revuojn agi simile.

● **Remado:** En la ĉi-jara Internacia Danuba Remado — evento, kiu longas 2 082 kilometrojn de FR Germanio al Bulgario — 12 el la 800 partoprenantoj estis esperantistoj, kiuj aktive informis pri la Internacia Lingvo inter la remantoj. Interesitoj pri simila venontjara agado skribu al: Monda Turismo, P.K. 45, BG-1090 Sofia, Bulgario.

● **Filatelo:** En junio la tutlanda dua kanalo de Kuba Televido komencis diskonigi la Esperanto-filatelon en sia tre populara matenprogramo „Dimanĉa Junulara Revuo”. En la sekcio „Kuriozaĵoj en Filatelo”, s-ro Jesús Castillo, estrarano de Kuba Esperanto-Asocio por edukado, montris diversajn Esperanto-filatelaĵojn por la unua fojo en la kuba televido. La postaj programoj montris aŭ montros ĉiumonate aliajn Esperanto-filatelaĵojn laŭ la temoj: Zamenhof (sept.), Kongresoj kaj jubileoj (okt.), Esperanto kiel informilo de tutmondaj okazaĵoj neesperantistaj (nov.) kaj „Esperanto-tutaĵoj” (dec.). La favora akcepto, kiun ricevis la junia elsendo, ebligis la postajn programojn.


● Okaze de la unua Ĉina Kongreso de Esperanto, kiu okazis fine de aŭgusto en Kunming, aperis oficialaj memorkoverto kaj poŝta stampo en Esperanto kaj la ĉina. Sur la malantaŭo de la bele presita koverto estas ĉinlingvaj informoj pri la Internacia Lingvo.

● **Geografio:** Pro la surpriza apero de la ĝenerala konsulo de Burkina Faso en la aŭgsburga UK, la Centra Oficejo de UEA ricevis demandojn pri la kio de tiu lando. Burkina Faso antaŭe portis la nomon Supra Volto [PIV: Voltalando] ĉe la rivero Volto [PIV: Voltao] (ĉefurbo: Ouagadougou, 1°28' Okc, 12°10' N).

● **Lerniloj:** *Aŭd-vida konversacia kurso de Esperanto por progresantoj* nomiĝas kompleto de stereofonia kaseto, koloraj lumbildoj kaj dek tekstokajeroj, kies verkinto estas Stano Marček. La instrumaterialo aparte taŭgas por intensaj kursoj, por vigligi klub-vesperojn kaj ankaŭ por memlernado. Ĝi mendeblas kontraŭ 100 guldenoj ĉe la aŭtoro (Zvolenská 15, CS-036 01 Martin, Ĉeĥoslovakio).

● **Fervojistoj:** Inter la partoprenantoj de la ĉi-jara Unua Ĉina Kongreso de Esperanto en Kunming estis multaj fervojistoj. Tie ili decidis starigi lokajn grupojn. Iliaj estroj siavice formas „gruparon de fervojistaj esperantistaj grupoj”, kies taskoj estas i.a. interŝanĝi spertojn pri fervoja laboro kaj plifortigi la rilatojn inter la landaj kaj mondaj fervojistaj esperantistoj.

Reportaĵo



● **Ariste:** La 17an de septembro Esperanto-Klubo de Tartu, Estonio, starigis en sia klubejo kupran bareliefon de Paul Ariste, skulptitan de Aulin Rimm. Paul Ariste estas profesoro pri finn-ugra lingvistiko en Universitato de Tartu, interlingvisto, membro de i.a. Akademio de Sciencoj de Estona SSR kaj ano de Honora Patrona Komitato de UEA. Li jam 60 jarojn estas membro de Esperanto-Klubo de Tartu.

● **Bulthuis:** La nederlandan Witte-premion por literaturo ĉi-jare gajnis Rico Bulthuis, filo de la Esperanto-verkisto H.J. Bulthuis, pro la romano *De koorddansers* (La ŝnurdancistoj). De li haveblas en Esperanto *La alia pasinteco* (tr. J. Isbrücker). Li ankaŭ ilustris la romanon *Inferio* de sia patro kaj kuntradukis nederlanden lian *La vila mano*.

● **Frank:** Prof. Helmar Frank, direktoro de Instituto pri Kiberntiko en Paderborn (FR Germanio), kiel la unua eksterlandano ricevis la honormedalon „Neumann” de la hungara Komputosciencia Societo Johano Neumann, interalie pro lia kontribuo al la sukcesigo de la konferencoj Interkomputo '82 kaj Interkomputo '85.

● **Lippmann:** La 13an de oktobro festis sian 90-jaran datrevenon d-ro Walter Lippmann. Li aktivas en la Esperantomovado jam de 1908. Dum aparte multaj jaroj li plenumas la funkcion de membro de Akademio de Esperanto, en kiu li dufoje estis la direktoro de la gramatika sekcio (1924-36 kaj 1951-65).

● **Triolle:** Ĝus fariĝis prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto s-ino Renée Triolle, kiu sekvas Jean-Louis Texier (vidu la artikolon sur paĝo 185). S-ino Triolle jam de multaj jaroj rolas centre en la agado skizita en tiu raporto — ŝi estis antaŭe la ĝenerala sekretario de UFE. Ĉu nun la franca estas la kvina landa asocio de UEA kun virina prezidanto?

Nekrologoj

CHARLES (CHUCK) E. CARSON (1910-1985), forpasis la 2an de septembro en Climax, Kanado. Li lernis Esperanton en 1969. Ne riĉa, sed ŝparema persono, Chuck Carson donacis en 1978 50 mil dolarojn al Kanada Esperanto-Asocio. En 1983 li donis la 70 mil dolarojn, kiuj fariĝis la koro de Eduka Fondaĵo Carson (vd. *Esperanto*, majo 1985). Per sia testamento li heredigis monon al UEA.

EDMUND FETHKE (1905-1985) mortis la 21an de septembro en Varsovio. Li 17-jara laboris kiel kompostisto por

Esperanto triumfonta, poste *Heroldo de Esperanto*. Li funkciis i.a. kiel estrano kaj vicprezidanto de Pola Esperanto-Asocio (1957-61) kaj vicprezidanto de Internacia Organiza Komitato de la Zamenhof-jaro. Kiel vicprezidanto de Loka Kongresa Komitato li malfermis la 44an UK en Varsovio. La Esperanta verkisto Jean Forge (Jan Fethke) estis lia frato.

VOJIN KOLAROV (1910-1985), komitatano de Jugoslavia Esperanto-Ligo (JEL) kaj sekretario de Serbia Esperanto-Ligo mortis la 3an de aŭgusto en Beogrado. Li grave kontribuis al la agado por enkonduki Esperanton en la lernejojn, i.a. kiel organizanto de kursoj. Kolarov ricevis honorojn de JEL kaj ŝtatan ordenon.



FRANJO VOKOUN (1909-1985) forpasis antaŭ nelonge en Jugoslavio, kie li estis la delegito de UEA en Zagrebo.

WILLEM RODENHUIS (1905-1985) mortis la 26an de septembro en Aerdenhout, Nederlando. Loke aktiva en Haarlem, li estis la kasisto de Nederlanda Esperanto-Asocio dum ok jaroj ĝis 1979, de kiam li funkciis kiel ĉefdelegito kaj peranto de UEA ĝis 1983, farante modelan laboron. Li estis plurjara membro de Societo Zamenhof.

GEORG SCHMIDT, inĝeniero, mortis antaŭ nelonge en Okcidenta Berlino. Li estis dumviva membro de UEA.

ELMA VIRTÄ forpasis la 25an de majo en Helsinko en la aĝo de 66 jaroj. Ŝi postlasis valoran kolekton de 250 volumoj al la biblioteko de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Oficiala Informilo

UEA HAVAS NOVAN PERANTON EN AŬSTRALIO

Post la forpaso de Kenneth G. Linton komence de majo ĉi-jare, kiu dum multaj jaroj estis komitatano de UEA kaj fidele plenumis la taskojn de la peranto kaj ĉefdelegito dum plenaj tri-dek jaroj, montriĝis malfacile trovi novan UEA-peranton en Aŭstralio. Dum Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj UEA serĉis novan oficeanton, s-ino Ivy M. Fallu el South Oakleigh, Vic., tute brave transprenis pli-malpli ĉiujn taskojn de peranto kaj tre akurate plenumis ilin dum ses monatoj. La Centra Oficejo esprimas al s-ino Fallu tre koran dankon pro tiu valora helpo.

Nun la landa asocio kaj UEA interkonsente bonvenigas novan peranton por Aŭstralio: **S-ino Sylvia M. Burkitt, 32 George Nobbs Drive, Castle Hill, N.S.W. 2154; ☎ (02) 634 1748.** Al s-ino Burkitt niaj aŭstraliaj membroj ekde nun bonvolu direkti ĉiujn pagojn (kaj demandojn) pri la UEA-kotizoj kaj kongresaj aliĝoj.

DONACOJ 1985 (Gld.)

ĝis la 24-a de oktobro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Finnlando: Tapio Sormunen 22,24. Nederlando: G.J.J. Gerritse 25,00. Sumo ĉi-jara 11 666,75

FONDAĴO CED: Svedio: Eric Castell 27,00. Sumo ĉi-jara 27,00 gld.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): FR Germanio: Rosel Schäfer 50. Sumo ĉi-jara \$ 3 100,00.

ĜENERALA KASO: Aŭkcio en la 70a UK Aŭgsburgo 2 587,23. Diversaj malgrandaj 6,10. Sumo ĉi-jara 8 619,27.

JUBILEA JARO: Irlando: Harry Harrison 112,00. Korea Respubliko: Hajpin Li 112,00. Sumo ĉi-jara 2 129,64.

POR RENOVIGO DE LA DOMO: Anonima donaco: 3 087,00. Sumo ĉi-jara 45 220,04 gld.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). *Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.*

39-jara lernanto serĉas korespondant(in)ojn, ĉiuj aĝoj, ĉiuj landoj. Volonte interŝanĝas bildkartojn, poŝtmarkojn, diapozitivojn, fotojn ktp. S-ro Alan Burgess, 3 Overdale Close, Woodthorpe, York. YO2 2RT, Britio.

Du komencantinoj 25- kaj 27-jaraj, laborantaj en medicina servo, deziras korespondi. Irena Mazurkiewicz, ul. A. Krzywów 5/21, PL-65-534 Zielona Góra, Pollando.

"Filatela Interŝanĝo Mondskala", Santiago Alvarez, Apartado aéreo 54-800, Bogotá 2, Kolombio.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Fiera Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

La familio de P. Todorov varme dankas siajn multnombrajn geamikojn pro la senditaj kondolencoj lige kun la forpaso de nia kara filo.

22 gekomencantoj 13-jaraj ŝatus (grupe) korespondi kun samaĝaj komencantoj. Ili ankaŭ volonte akceptas salutojn el la tuta mondo. Esperanto-kurso Väterledsskolan, S-199 62 Enköping, Svedio.

Juna advokato serĉas junulinon. Fotografiaĵo bonvena. Apartat 2503, Barcelona, Hispanio.

Ĝemelan Esperanto-grupon en Eŭropo serĉas Omida Kultura Asocio, P.O. Box 71365-749, Shiraz, Irano.

Volas korespondi tutmonde Haraga Ioan, Micra 3, Bloc A3, Ap. 38, R-5100 Buzau, Rumanio.

Hola gesamideanoj! Se por vi Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ideo kaj „nova sento”, tiam skribu al: Homarana Asocio, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio. Ni havas ion interesan por vi!

L'Espéranto dans l'enseignement: d-ro Pol Denoël. 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. Prezo: 100 B.fr.

Initiation théorique et pratique: d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. Prezo: 250 B.fr.; kaseto: 150 B.fr.; **Corrigé des exercices:** 80 B.fr.

Aerpoŝtaj leterpapero kaj kovertoj: kun surprisitaĵoj stelo kaj la vorto *Esperanto*. Pakajoj de 50 folioj aŭ 50 kovertoj. Prezo: 145 B.fr.

Gluafiŝo: Internacia Lingvo Esperanto: kun homa figuro kaj verda stelo. 7 × 17 cm. Prezo: 25 B.fr.


Novjaraj gratulkartoj: kvar diverskoloraj kartoj (kun kovertoj) en kvin lingvoj: Esperanto, la franca, nederlanda, angla kaj germana. Prezo: 60 B.fr.

Glutikedo "Esperanto 1887-1987": Orkolore presita. Uzeblaj sur korespondaĵoj ktp. Prezo de koverto kun 100 glutikedoj (minimuma mendokvanto): 100 B.fr. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj.

Last' aperis: Dumonata. Informilo pri novaj libroj, kasedoj ktp. Do, kiam vi deziras scii, kio aperis en la libromerkato, bv. tiam aboni al *Last' aperis*. En ĉiu numero vi trovos *Vestfaliaj flugfolioj* de Rikardo Ŝulco. Kun recenzoj pri esperantaĵoj. La abonprezo estas 15 gld. *Ĉiuj tutnovaj devizaj abonantoj, kiuj nun pagas al la konto "snrl-v" por 1986* (tiu oferto validas nur ĝis 31 dec. '85) ricevos senpage la lastajn ĉi-jarajn numerojn, ekde la momento de abono ĝis la fino de 1985 (ĝis eventuala elĉerpiĝo). Bv. pagi al nia UEA-konto "snrl-v" kaj sendi la duan folion de la ĝirilo al Eldonejo & Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk Belgio.

KLUB-SEKRETARIOJ!

Metu vian lokan grupon sur la mapon!



Mendu konstantan anonceton pri viaj klub-kunveno en la Jarlibro. Tiel vi ricevos pli da vizitantoj el eksterlando. Petu nun mendilon de la Centra Oficejo. La traifo estas po 1 irpk por ĉiu vorto; la limdato estas la 1a de januaro 1986.

URĜA ALVOKO: La sola espero rilate la solvon de la mondvastaj problemoj estas la reveno al la bibliaj instruoj. Por ricevi senpagan libreton kun fascinaj detaloj, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH 17 7LN** aŭ, se ekster Eŭropo al: **P.O. Box 373, Baronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

PLENA ANALIZA GRAMATIKO



UEA

Post la monumenta *Esperanta antologio* ĵus aperis la dua volumo en la prestiĝa Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*:

la kvina, korektita eldono de

Plena analiza gramatiko de Esperanto

de Kalocsay kaj Waringhien

Ĉi tiu fama verko malkovras la tradician, klasikan uzadon de la lingvo. En ĝin la aŭtoroj metis la resumon de siaj konstantaj esploroj pri la lingvaĵo de Zamenhof, Grabowski, Kabe kaj aliaj plej famaj aŭtoroj kaj la plej bonan el sia sperto kiel tradukistoj. Temas pri praktika helpilo pri la lingvouzo. Korektita de Gaston Waringhien. Kun grafika aranĝo kaj la kompleta indekso de la temoj. Kovrilo speciale desegnita de Franko Luin.

Plena analiza gramatiko de Esperanto (1935) de Kálmán Kalocsay (1891-1976) kaj Gaston Waringhien (1901).

Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 1985 (5a, korektita eldono). 599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 032 8. Prezo: **48,00 gld.** plus sendokostoj. (Rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj.)

Perkomputila tekstoprilaboro



Scienca Eldona Centro

Aperis ĵus la plej ampleksa projekto de Scienca Eldona Centro: 336-paĝa libro pri tekstprilaborado komputila. Ĝi prezentas 21 studojn pri aktualaj aspektoj de la aŭtomata tekstprilaboro, verkitaj de eminentaj fakuloj el Ĉinio (Ouyang), Francio (Janot-Giorgetti k.a.), FR Germanio (Maas), Germana DR (Meier k.a.), Hispanio (de Sopeña), Hungario (Gordos k.a.), Japanio (Niŝida), Nederlando (Witkam, de Kat), Pollando (Jassem k.a.) kaj Usono (Sherwood). La artikoloj estas ordigitaj laŭ kvar sekcioj: Parol-prilaboro, Aŭtomata lingvo-analizo, Perkomputila tradukado kaj Komunikado inter homo kaj maŝino.

Perkomputila tekstprilaboro, redaktis Ilona Koutny. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro, 1985. 336p. 22cm. Ilus. ISBN 963 571 147 6. Kun ampleksa bibliografio, biografiaj notoj pri la aŭtoroj kaj 10 paĝoj de resumo en la angla kaj rusa. Prezo: 30,00 gld. plus sendokostoj. Rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

De 66 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, libreccenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.


Jarabono: 13,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (37 guldenoj; por Nederlando 38,85 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, E-28036 Madrid 16, Hispanujo
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

iam kompletigota plena verkaro de I.I. Zamenhof

Kio pli trafa ol ekkompletigi sian kolekton de tiu ĉi monumenta serio okaze de la Tago de la Esperanto-Libro (la 15an de decembro)? La unua volumo de la originalaĵoj (*unuaj libroj por esperantistoj*) ne plu haveblas aparte sed nur en kompleto kun: ■ *la inkunabloj de esperanto* ■ *ni laboru kaj esperu!* ■ *antaŭen al la laboro!* ■



eldonejo ludovikito

tamen la afero progresas! ■ *hebreo el la geto* ■ *kun gradaj paŝoj eksterlanden!* ■ *klopodis organizi, sed vane!* ■ *por kaj kontraŭ reformoj!* ■ *mortinta, sed senmorta!* ■ La kompleto kostas 390,00 gld, unuopaj volumoj po 39,00 gld. Aperis du pliaj volumoj de originalaĵoj: ■ *la neforgeseblaj kongresoj* ■ *postrikolto de ludovikaĵoj* ■ kaj tradukvolumo: ■ *de patronia al ŝekspir* ■ (ĉiuj po 48,00 gld.) kaj du kromkajeroj: ■ *senlegenda biografio de I.I. Zamenhof* ■ *korespondaĵo ludovikologia* ■ (po 33,00 gld.). Ĉio ĉe: uea, jei, kleg.